

Bô Yin Râ

LA LIBRO PRI
LA TRANSA MONDO

Bô Yin Râ estas la spirita nomo de
Joseph Anton Schneiderfranken (1876 – 1943)

El la Germana originalo
(„Das Buch vom Jenseits“, 4a eldono, represo de la eldono de 1929)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

© 1929 kaj 1978
êe Kober Verlag Bern, Svislando

Enkonduko

La sekvantaj tri traktaĵoj donu al vi, – kiom estas fareble per vortoj, – imagon pri tio, kio atendas vin, kiam la estingiĝo de via terkorpa vivo malligas vin el tiu ĉi *fiziksensa* fenomena mondo.

Kiel vojaĝa gvidlibro priskribas al vi regionojn de la terglobo, kiujn vi neniam vidis, tiel same estu nun dirata al vi tio esenca pri la „lando“ ankoraŭ nekonata al vi, en kiu vi troviĝos kapabla sperti post via morto, – indiferente, ĉu vi povas kredi nun je la ebleco de tia spertado, aŭ ne.

Samtempe tiu ĉi libro celas liberigi vin de kelkaj eraroj katenantaj vin, kiam vi pensas pri la mortintaj homoj amitaj de vi dum ilia surtera vivo.

Timema kredo kaj ekzaltita superstiĉo el antikva kaj moderna tempoj kreis tiom multe da bildoj fantaziaj pri la „transa mondo“, ke estas necese trarigardi tiun kaosajon, por ke ĝi ne plu konfuzu vian imagon.

La *solaj*, kiuj havas por diri ion vere *aŭtentikan* pri la vivo post la morto de la videbla korpo, estas kelkaj, malmultaj homoj, kiuj konas tiun vivon, kiu *ne* bezonas la teran korpon, el propra, sekura *sper-*

to, kvankam ili samtempe, en sia tera korpo, travivas la suferon kaj ĝojon de ĉi tiu tero, same kiel vi.

Kiel unu el tiuj malmultaj homoj konsciantaj la transan mondon, mi tie ĉi donas tion, kio montriĝas komunikebla per vortoj, ĉar ni sentas la sopiron de nia tempo, kiu prave atendas, ke ne plu estu gardata kiel „sekreta scio“ la spirita sperto, kiu ie kaj iam atingis la konscion de nur *malmultaj* homoj.

Tio, kion mi povas diri al vi, servu al via bono!

Miaj paroloj sukcesu veki vian plej internan memsentadon, por ke doniĝu al vi *el vi mem* la *certece*, kiu sola povas vere sekurigi vin kontraŭ sterila skeptikismo, same kiel kontraŭ senkritika memfordono al ĉiaj revaĵoj de trompitaĵoj aŭ tro ekscititaj homaj cerboj.

En vi mem vi trovu la mezurilon, per kiu vi estonte povas kontroli, kiom da vero kaj kiom da eraro estas entenata en la imagaĵoj, kiujn la tera homo kreis al si ekde la plej antikva tempo por povi elteni la tenebron de abismaj enigmoj; tenebron, kiu ĉiufoje malfermiĝis al li, kiam li staris antaŭ mortinto.

Ne temas pri tio, ke tie ĉi vi *opiniu ion vera*, ĉar la aferoj, pri kiuj mi parolas, ne dependas de via konsento aŭ malkonsento; kaj ĉi tie mi ne donas al vi kredoinstruon, sed montras al vi fenomenan formon de la realo, kiun vi ankoraŭ ne povas ekkoni

aliamaniere ol en imagaĵo perita helpe de vortoj de homa lingvo.

Sufiĉe frue vi ekkonos la parton al vi konforman en tiu manifestiĝa regiono de la realo ankaŭ *mem spertante ...*

En ĉiuj tempoj, homoj konsciantaj la transan mondon atestis la realon, sed ilia atesto fariĝis predo de nevokitoj kaj senrespondecaj vortfalsigantoj. Tial vi hodiaŭ bezonas helpon, se vi volas lerni malimpliki tion, kio *devas* esti malimplikata, por ke ne, *kune* kun la produktoj de konfuzitaj fantaziuloj, ankaŭ la sciigo de veraj sciantoj subfalu al la mallestimo de ĉiuj homoj sentantaj pure kaj honeste.

Ĉi tie temas vere ne pri varbado de anoj por hipotezo de religia filozofio, aŭ eĉ pri la provo fondi novan formon de religio, – sed pri atesto por la *spirita* (ne „cerba“) *pra-spertado*, kiu estis je la komenco de ĉiu granda malnova religio naskita *el la spirito de Dio ...*

Tial la vive sentanta okupiĝo pri tio prezentita ĉi tie *tute ne* kondiĉas *deturniĝon* de tradicia religio kiun oni tenis sankta, sed male: tia okupiĝo alportos tie, kie honorindaj religiaj formoj kaj kredotezoj ankoraŭ vere estas bezonoj de la vivo, nur *profundigon, firmigon* de la kredo kaj *plifaciligon de kredado, helpon al la povo kredi.*

Sed al tiuj, kiuj jam de longe ne plu estas ligitaj al iu religio, miaj vortoj malbaros la alirejon al spiritaĵaj regionoj, kiujn atingi *restas* la plej alta *sopiro* de la tera homo, eĉ se la kredmaniero de liaj prauloj ne kondukis lin al la arde dezirita plenumiĝo konforma al lia individua naturo.

La arto de mortado

Vi certe pensos, ke morti estas ne „*arto*“, sed malbonaĵo kiun oni *devas* suferi, kaj ke *ĝi lerniĝas el si mem*.

Sennombraj homoj pensas same kiel vi, kaj ĉiutage sennombraj homoj forlasas sian teran korpon, sen esti iam lerninta la arton de mortado.

Al multaj la morto venas neatendite „kiel ŝtelisto en la nokto“, – al aliaj ĝi venas kiel timata fantomo, – al aliaj kiel finfine aperinta liberiganto de iliaj suferoj, – kaj aliaj mem vokas lin, ĉar ili atendas, ke ĝi liberigos ilin de zorgoj kaj mizero korpaj kaj animaj.

Sed malofte la morto renkontas iun, kiu *scias* la arton de mortado. – –

Por scii tiun ĉi arton vi devas esti *lerninta* dum via tempo de freŝa vivo, kio *estas* la „morto“, kion *signifas* „morti“.

Vi devas, dum la tempo de pleneco de viaj fortoj, kvazaŭ morti „*prove*“, por ke vi *sciu* morti, kiam la morto vin *surprizas*. – –

Mortado ne estas tiom *facila*, kiom multaj opini-
as, sed ĝi ankaŭ ne estas *tro malfacila*, se oni lernis
ĝin antaŭe, en fortoplena tempo ...

Ĉiu arto devas esti *ekzercata*, kaj sen ekzercado
oni ankaŭ ne lernas morti.

Tamen iun tagon oni devas trapasi la mortadon,
ĉu oni scipovas morti aŭ ne. –

La plej multaj homoj *timas* la mortadon, ĉar ili
ne scias precize, kio okazas dum ĝi.

Sed tiuj dirantaj, ke ili *ne* timas, egalas al infanoj
veturantaj en boato altamaren, sen koni la danĝe-
rojn de la maro. – –

Vi estu kiel stiristo, kiu konas la ventojn kaj
marfluojn kaj scias, kiuj landoj atendas lin transe de
la maro.

Vi lernu *precize fiksi* la kurson de via bone
 ekipita barko. – –

„Morti“ signifas, ke one devas forlasi la teran
korpon kaj rezigni pri ĝiaj sensorganoj, *por ĉiam*

kaj definitive, tial ke pro fizikaj kaŭzoj la korpo ne plu povas subteni sin.

Tre simila proceso okazas ĉiufoje, kiam vi kuŝiĝas por ripozi kaj transdonas vin al la dormo, – krom ke en tio vi perdas *nur parte* la mastrecon pri korpo kaj sensoj, dum en morto vi perdas ĝin plene kaj *nerevenigeble*.

Vi vidas, kiel la naturo kvazaŭ mem instruas al vi la mortadon.

Vi povas simile antaŭsperti la mortadon en sveno, aŭ kiam via konscio estas subpremata per arta rimedo.

Sed en ĉiu el tiuj okazoj vi spertas nur la *unuan* parton de la proceso, – escepte, se viaj internaj, spirantaj „sensoj“ jam disvolviĝis tiugrade, ke vi povas ekkonscii vin mem „sur la alia flanko“, kaj tiam, miregante, trovas vin mem *vivanta eĉ sen* la tera korpo...

Se vi ankoraŭ ne havas tian sperton, viaj dumnoktaj sonĝoj povas servi al vi, almenaŭ *komprenigi* al vi la konscian vivon sen fizika korpo, kvankam la „transa“ vivo vere estas *alio* ol nur „sonĝo“.–

Mi tie ĉi devas nur *memorigi* vin pri la vivo en sonĝo por helpi al via kompreno.

Kiel ensonĝe vi trovas vin *konscia, sentema, pensanta kaj aganta*, – kiel vi ensonĝe vivas en

„korpo“ kaj libere uzas ĝin, kvankam via fizika korpo trankvile kuŝas sur sia kuŝejo en profunda dormo, – tiel vi trovas vin ankaŭ en *korpa* formo, *konscia*, *sentanta*, *pensanta* kaj *aganta*, kiam vi povas uzi viajn spiritajn „sensojn“ sur la alia flanko de la ekzisto kaj rezulte konsciiĝas tie *pri vi mem*, ĉu nur portempe, ĉu – post la morto de la tera korpo – por ĉiam.

Sed esenca diferenco konsistas en tio, ke en-songe vi vidas nur la ĉiam disfluantajn formaĵojn de via plastika fantazio, kiuj rezulte de mil fizikaj kaj psikaj stimuloj akiras ŝajnan vivon propran, dum vi devas, por vekigi en la objekte donita *spirita* mondo, – egale, en kiu el ties regionoj vi povas vekigi, – vi devas *forlasi* la regionon de songoj tiel same, kiel vi ĝin forlasis por vekigi en la *fiziksense* perceptebla mondo fenomenaj. –

Nur kiam vi „*superpaŝis*“ la regionon de songoj, vi eniras en la regionon de la *spirito*, kiu estas facile distingebla eĉ de viaj plej viglaj kaj „plej laŭnaturaj“ songoj, ĉar pere de viaj spiritaj sensoj vi estas en stato de konscio, kompare kun kiu eĉ la plej konscia dumtaga vivo sur tiu ĉi tero aperas nur kiel somnambulado. –

Vi vidas, aŭdas kaj sentas la saman *kaŭzan* „mondon“, kiun vi perceptas en la dumtaga konscio

de via *fizika* ekzisto kiel la *fizikan* mondon fenomenan, – sed vi perceptas ĝin „*de la alia flanko*“. – –

La formoj de la *kaŭza, reale estanta* mondo, kiuj estis *nepercepteblaj* al vi en via fizika korpo, subite estas *percepteblaj* al vi, kaj la aferoj nur *fiziksense* percepteblaj, kiujn vi ĝis nun nomis la „reala“ mondo, fariĝas al vi: „malplena spaco“. –

Kvankam nur relative malmultaj homoj spertis en si tiun staton dum sia terkorpora vivo, kaj spertas ĝin ankaŭ en la nuna tempo, ilia nombro estas multe pli granda ol kiom oni supozas, ĉar la plej multaj homoj, al kiuj doniĝis tia spertado, instinkte kaŝas ĝin antaŭ aliuloj, ĉu pro timo, ke tiuj ne kredos ilin kaj elmetos ilin al la „*malbeno de ridindeco*“, ĉu pro timo, ke la spirita spertado, kiu estas sentata kiel aparta graco, povus esti forprenata, se oni ne scius silenti.

Komence ne estas *altaj* spiritaj regionoj, kiuj estas alireblaj por tiaj homoj interne konscie spertantaj, sed ĉiuokaze „*la alia bordo*“ jam estas atingita, eĉ se tiuj ekkonsciiĝintaj tie ankoraŭ tute ne estas kapabla antaŭeniĝi en la „*internon*“ de la malkovrita „lando“, aŭ eĉ supreniri sur ties altajn „*montarojn*“. –

Tien povas veni dum la surtera vivo nur la ekstreme malmultaj homoj, al kiuj tie ĉi sur la *fizika*

flanko de la kaŭza mondo estis konfidata la praantikva „*heredaĵo*“ de kaŝa spirita sperto: – la *naskitaj* „arkipastroj“, – la „majstroj“ de la vualita *spirita* agado kaj iliaj legitimaj posteuloj *naskitaj* kiel tiaj.

Kio per konscia vivado en la „transa mondo“ fariĝis al ni scio certa, bazita sur sperto, tio estas donata al vi ĉi tie.

Ĉiutage kaj ĉiuhore ni vidas milojn da homoj suriri sur „la alian bordon“ *por ĉiam*, ne povante *helpi* ilin, ĉar ili ne praktikis dum sia surtera vivo la arton de mortado, kaj tial ili alvenas al la „alia bordo“ *nepreparate*, kiel ŝiprompuloj ĵetitaj de ŝtormo sur la landon ...

Konsternite ili erarvagadas en la por ili nova formo de ekzisto kaj ne kapablas ekpreni la helpantajn manojn, kiuj etendiĝas renkonte al ili.

Ankoraŭ mankas al ili ĉia kapablo juĝi, ĉu tio renkontanta ilin alportas danĝeron aŭ helpon, kaj timoplene ili forturniĝas, kiam iu, kiu *povus* ilin gvidi, proksimiĝas al ili ...

Do ili plu vagadas *sole*, ĉiam proksime de la „bordo“ de l’ maro, kiu – almenaŭ laŭ ilia sento – ankoraŭ ligas ilin kun la forlasita *fizika* flanko de la ekzisto, ĝis ili, kvazaŭ „magnete“ altirite, malkovras unu el tiuj malgrandaj „bordaj regnoj“, – la *plej*

malaltaj regionoj de la spirita, al teraj sensoj neperceptebla flanko de la kosmo, – kiu konformas al iliaj ideoj kaj al la sopirado kaj esperado karesitaj de ili dum la surtera vivo.

Tiam ili kredas esti trovinta sian „ĉielon“, tiom pli, ke la samo estas kredata de ĉiuj aliaj, kiujn ili tie renkontas ...

Kiuj alvenis tie, estas subfalintaj al sia sorto por treege longa tempo.

Nur ekstreme malofte, kaj eĉ tiam nur per superado de plej grandaj malfacilaĵoj, ni sukcesas eltiri supren la devojiĝintojn el ilia memelektita trompa „beateco“. –

Sed ĉar ni volas instrui la evitadon de nerektaj vojoj, kaj ĉar la eterna *amo* ordonas al ni agi tiel, ni instruas al vi la arton de ĝusta mortado.

La esenco de tiu arto konsistas *en tio*, ke *ĉiu-tempe* – meze de farado de planoj pri la estonteco kaj meze de plej vigla agado, en tempo de floranta saneco kaj plej freŝa forto – oni estas *preta*, kun gaja sereneco kaj firma fido, suriri sur la „transan bordon“ por ĉiam, sen la ebleco de reveno.

Kio estas postulata, estas stato de *animo kaj koro*.

Kvankam ĝi eble ne ŝajnas facile atingebla por ĉiu homo, neniŭ forgesu, ke sole tiu ĉi stato ebligas la ĝustan mortadon. –

Kiun la aferoj de la fizika surtera vivo povas teni tiom firme, ke li opinias ne povi malhavi ilin, – kiu ne povas imagi staton, en kiu ĉiuj celoj de tereca dezirado fariĝas malgravaj, – tiu apenaŭ povos lerni la arton de ĝusta mortado. –

Sed ĝuste kaj ĝoje *vivi* sur la tero scias nur tiu homo, kiu povas ĉiutage kaj ĉiuhore estigi en si per sia volo la staton de preteco morti, – libere de ĉia timo kaj ĉiu tristeco. – –

Li scias, ke neniŭ el tiuj, kiujn li devus postlasi tie ĉi, – eĉ se ili estus la plej amataj homoj, la estaĵoj plej prizorgendaj, – iam *povas* esti apartigata disde li, se li ne mem *volas* la veran apartigon kaj *faras* ĝin per sia volo. –

Li scias, ke li restos „tie ĉi“, je la sama kosma „loko“, – estante *eĉ pli proksima* al la homoj amataj de li, ol kiom li povis proksimiĝi al ili dum la surtera vivo. –

Li scias, ke post la morto li certe ne estos ŝanĝita en formon kvazaŭ dian kaj li neniom estos tere „ĉi-opova“, sed ke al tiuj bezonantaj lian helpon li kapablos helpi multege pli, ol kiom povis iam ebligi en la *fizika* vivo. – –

Kiu praktikas la arton de mortado en tia maniero, tiu estontece scias, ke al li fariĝos *facile* morti *reale* kaj *definitive*, eĉ se la morto renkontus lin tute *neatendite* ...

La observado fare de kuracistoj-esploristoj jam antaŭ longe montris, ke la *fizika proceso* de la mortado eble estas turmentoplena *por ĉeestanto*, sed ke la mortanto mem *ne* suferas je ĝi; li sentas la dolorojn ligitajn kun lia malsano nur tiom longe, kiom li *ankoraŭ ne* estas mortinta.

Sed ni devas montri ĉi tie nur, en kiu maniero la *konscio* de la mortanto *transvivas* la proceson de mortado.

Eĉ se la mortanto estas plene konscia ĝis la lasta momento, tamen, en la momento de komenciĝanta malligiĝo de la spirita organismo disde la animala, tera korpo ĝis tiam unuigita kun ĝi, okazas speco de „endormetiĝo“, el kiu la konscio vekiĝas al si mem nur, kiam la „mortado“ jam estas finiĝinta.

En la momento de tiu vekiĝo, kiu okazas kelkajn sekundojn aŭ minutojn post la „morto“ ekstere konstatebla, la homo jam trovas sin en sia *spirita* organismo, kiu sola nun peras sperton al li, sur la nur *spirite* perceptebla „alia flanko“ de la *kaŭza* mondo: – la eterna „realo“, kiu elradias el si ĉiun *spiri-*

tan kaj ĉiun *fizikan* formon de ekzisto, depende de la perceptomaniero ekscitanta ĝin.

La antaŭa perceptokapablo de la mortinto, kapablo kondiĉita de liaj *fizikaj* sensoj, estis anstataŭigata de nova speco de *perceptado*, kiun antaŭe li normale ne konis, dum lia form-estiganta *perceptomaniero* unuatempe restas neŝanĝita.

Estas tre malproksime de li rigardi sin kiel mortintan, ĉar li trovas sin *konscia* pri si mem, *volanta*, kaj *kapabla percepti*, kvankam li ankoraŭ ne rimarkas, ke la organoj nun sole servantaj lin estas organoj *spiritaj*.

Li tute ne sentas sin „senforma“, ĉar lia ĝistiam *fizika* korpo estis pli aŭ malpli perfekta *bildo* de la *spirita* organismo formita – kvankam nekonscie por la cerba scio – de la propra eterna volo, organismo, kiun la konscio nun kapabliĝis *percepti*, kvankam ĝi ankoraŭ ne ekkonas tiun organismon kiel ion *differentan* de la *fizika* korpo.

Kiel fizika doloro tuj ĉesas, kiam doloranta membro de la tera korpo estas nesensivigata per taŭgaj rimedoj, – tiel ankaŭ la fizikaj doloroj, je kiuj mortanto estis suferanta antaŭ sia morto, estas tute malaperintaj en la momento de „transa“ veikiĝo, ĉar la fizika korpo, en kiu kuŝas la *kaŭzo* de la dolorsento, nun restas definitive *apartigita* de la *spirita* organismo nun sentanta *sole* sin mem. –

Sed ekzistas ankoraŭ certa „*fluideca*“ ligo rezultanta el nevideblaj, subtilaj kaj ankaŭ al la spirita organismo senteblaj, fajnmateriaj radiaĵoj de la ĝis tiam uzita fizika korpo, kaj tiu ligo kaŭzas, ke tiu transe vekiĝinta perceptas diversajn okazaĵojn proksime de la forlasita korpo *spiritamaniere*, kvankam ili okazas en la *fizika* mondo.

Sekve tiu nun „transe vekiĝinta“ sentas la „fluecajn“ influojn el la kontraŭradiado de la homoj ĉirkaŭantaj la forlasitan teran korpon, sentas la „*sentovaloron*“ de iliaj *tuŝoj* kaj *paroloj*, kaj ankoraŭ havas, kvazaŭ kiel blindulo, sufiĉe precizan imagaĵon de la forlasita ekstera ĉambro, – sed ekzistas la trompiĝo, ke la ĉambro estas perceptata per la fizikaj sensoj.

Tiuj lastaj rilatoj al la *fiziksensa* flanko de la kaŭza mondo ankoraŭ daŭras kelkan tempon, kvankam la kadavro estas jam tute malvarmiĝinta, sed tio ankoraŭ tiel sentata plimalfortiĝas de horo al horo, kaj la kapablo percepti ĝin tute ĉesas, kiam la unuaj fenomenoj de malkomponiĝo aperas.

Al tiuj malaprobantaj la kutimon bruli kadavrojn, aŭ kredantaj ke la mortinto povus esti „*damagata*“ per tio en sia transa vivo, estu dirate tie ĉi, ke, post la limtempo observenda en kulturlandoj antaŭ la sepultado de kadavro, ĉiu percepta rilato

inter la spirita organismo de la mortinto kaj lia iama tera korpo estas ĉesinta.

Kiam fajro estas la *kaŭzo* de la morto, doloro estas sentata – kiel ĉe ĉiu *alia* kaŭzo de morto – nur ĝis la perdo de la fizike ligita konscio, sed post la transa „vekiĝo“ ĉiu rilato al la iama tera korpo estas estingiĝinta, pro la malkomponiĝo kaŭzita de la *fajro*.

Ne estingiĝas la konscio de la propra *ĉeesto*, nun sentata per la *spirita* organismo, nek la klara vidado kaj ekkonado de ĉiuj ĉeestantaj homoj en ties spiritaĵoj, kiuj plene *konformas* al la *teraj* formoj, aparte de fizikaj malhelpoj al ilia surtera manifestado.

Mortintoj, kies konscio leviĝis dum ilia surtera vivo nur malmulte super la sferon de fizika-animaleca ekzisto, ofte estas trompataj de la nova stato tiom forte, ke dum longa tempo post sia forpaso ili ne rimarkas, ke ili ne plu estas en sia fizika korpo.

Ili rigardas sin nur kiel „resaniĝintaj“, ĉar la iama kaŭzo de iliaj suferoj ne plu ekzistas.

Tial, ke ili unuatempe estas fiksitaj en speco de sonĝeca imagado de tera vivado, miksiĝas en ili la perceptado de la spirita formo de iliaj familianoj kun la figuroj estigitaj de ili mem en la propra

sonĝeca vivo, kaj la mortintoj ne komprenas, kial oni funebras pri ili.

Multaj el ili tiam provas per ĉiuj siaj fortoj konvinki la funebrantojn, ke ekzistas nenia kialo por funebri, – sed tiu penado ne estas sentata de la postrestintoj en la fizika mondo pro ilia dolora emocio.

Nur sekve de la senpotenceco sentata pro la ŝajna stulteco de familianoj kaj amikoj la mortinto subite ekkonas, ke li ne plu havas *fizikan* korpon, kaj tiel vekigâs el sia memkreita sonĝo.

Nur tiam li „eklernas vidi“ vere, kaj liaj spiritaj okuloj malfermiĝas al la nova *spirita* flanko de la kaŭza mondo, kies sferon de *fiziksensa* perceptado li forlasis, sen ŝanĝi la kosman „lokon“.

Por tiuj ne praktikintaj dum sia surtera vivo „la arton de mortado“, nun komencas *spirita* erarado, ĉar la perceptado per la spirita organismo de homo *ne* estas pliintensigata per la morto super la nivelon de certeco antaŭe atingitan.

Tuj proksimiĝas helpemaj helpantoj, sed ili ne estas ekkonataj kiel tiaj.

Anstataŭe, la mortintoj obseditaj de iliaj propraj teraj opinioj tre decide kaj memkonscie *rifuzas* tiujn helpantojn, tiel ke nenia helpo povas esti donata.

La certeco, ke oni estas fakte atinginta la „transan“ vivon, ofte estigas senliman orgojlon, kiu tiom pli firmigas la de ĝi kaptitajn en iliaj malsaĝaĵoj.

Kiu estis tute katenita al tio tera, aŭ estis tro forte ligita kun siaj zorgoj al aferoj kaj homoj, al kiuj nun li ne plu *povas* reiri *fizike* agante, tiu estas, ekkonante la neeblecon de reiro, kaptata de turmento-plena malespero, kiu devas esti traluktata antaŭ ol li kapabliĝas *ekkoni* siajn *novajn* eblojn agi rilate al la tera mondo, kiuj nun estas de pure *spirita* speco. –

Sed tiuj, kiuj en la fizika vivo estis tute kunkreskintaj kun la strebado al tera realigo de „ideo“, kaj kun la imagoj estigitaj en tiu strebado, baldaŭ perdas preskaŭ ĉiun intereson pri la forlasita fizika mondo.

Ili serĉas nur oportunon por *realigi* sian „ideon“ nun ene de sia *nova* vivosfero kaj estas blindaj pri ĉiuj novaj ebloj de spertado.

Aliaj serĉas la „*beatecon*“, kiu estis promesita al ili kaj kiun ili piakrede atendis, kaj forte miras, ke ili ne *tuj*, kaj en la formo tiom bele *reve imagita* de ili surtere, trovis ĝin en la „transa mondo“.

Al ĉiuj ĉi, okupiĝantaj pri si mem kaj pri la imagaro kunportita de ili, fine doniĝas speco de plenumiĝo de iliaj deziroj, per tio, ke ili atingas iun el la malaltaj spiritaj regnoj, kies nekonsciaj kunkreantoj ili jam estis surtere ...

Ankaŭ tiu ĉi transiro ne estas „ŝanĝo de loko“, ĉar ĉiuj spiritaj mondoj, – kaj da tiuj ekzistas *sen-nombraj*, ĝis supren al la plej alta kaj plej pura mondo de *dionaskanta* spirito, – estas, interpenetrante, je la sama kosma „loko“. –

La konscia spertado de spiritaj mondoj, kaj la transiro de unu al alia, dependas de certa ŝanĝo en perceptado, kiu faras la spiritan konscion kvazaŭ „blinda“ por certaj fenomenoj, sed „vidkapabla“ por aliaj.

Sed ĝuste tiu ŝanĝo en perceptado *ne* povas esti kaŭzata *arbitre*, krom de la majstroj de eterna manifestado de la homo en la *plej alta* spirita regno, aŭ iliaj komisiitoj: iliaj elektitaj disĉiploj, se ties propra psikofizika ecaro estas taŭga por tio.

Tamen *ĉiu* homo, eĉ se li *ne* apartenas al la malmultaj supre indikitaj, povas *konatiĝi per la imago* kun la sentoj kaj konsciostatoj, kiuj, laŭ la sciigoj donitaj de ni ĉi tie, atendas lin post la morto de la fizika korpo.

Mi ne rifuzas la objeton, ke tia pervola ekscitado de la imago ĉiam povas estigi nur „*bildojn*“, sed neniukaze povas konduki al spertado de la *reala* postmorta esto.

Ĝuste tial mi postulas, ke, en la formado de la imagaj bildoj tie ĉi necesaj, oni *plej strikte* tenu sin

je la prezentaĵoj donitaj de mi en tiu ĉi libro, ĉar nur al *tre malmultaj* homoj estas eble jam *dum ilia surtera vivo* konscie koniĝi kun la sfero de postmorta esto, sed al *ĉiuj* homoj estas eble, per la vekado de imagaj bildoj *konformaj al la realo*, kvazaŭ antaŭe travivi la *sentojn kaj konsciostatojn*, kiuj estas atendotaj post la morto.

Tia, sufiĉe ofta *antaŭ-travivado* estas necesa, se oni volas esti certa, ke, post la malligiĝo de la konscio el la maniero de fiziksensa spertado, oni povu tuj orienti sin kaj antaŭ ĉio ekkoni, kio estas *serĉenda* kaj kio *evitenda*.

Nur kiu akiris tiun certecon jam *dum sia surtera vivo*, tiu, post la transiro al la nova, pure *spiritsensa* perceptomaniero, tuj malkovros la helpantajn manojn, kiuj tie etendiĝas renkonte al li, kaj li scios konfidante ekpreni ilin ...

Al tiu ni povas helpi.

Li sciis „lerni“ la arton de mortado jam dum sia surtera ekzisto, kaj rezulte de lia konfido al nia instruo maturiĝis en li ĉiu kapablo de ekkono, kiun li nun bezonas.

Li estos protektita kontraŭ ĉia trompo kaj senluziiĝo.

Ni kondukas lin – preter la diversaj „bordoregnoj“ kreitaj de terhoma revado kaj opiniado per la

fortoj de misgvidita volo – tuj en la „*internon*“ de la „lando“, kie amoplena gvidado pli kaj pli proksimigas lin al lia perfekteco.

Per la forlaso de sia tera korpo li certe *ne* estas fariĝinta „*alia homo*“!

Oni povas doni al li ne *subite* tion, kio ankoraŭ mankas al li. –

Nur tion, kion li *surtere* jam sciis *akiri*, li kunportas kun si kiel posedaĵon.

Kion li sciis *ligi* sur la tero, tio restas „*ligita*“ por li ankaŭ en la spiritasensa vivo, kaj kion li *mal-ligis* en la surtera vivo, tio restas „*malligita*“ por li ankaŭ nun ...

Iom post iom oni povas konduki lin pli kaj pli alten, ĝis li iam kapabliĝas eniri en la plej subliman el ĉiuj spiritaj regnoj: – en la puran *lumomondon* de plej beata kaj absoluta *plenumiĝo*. – –

La „tempoj“ bezonataj por tiu ascendo estas difinitaj per la grado, surtere jam atingita, de relativa spirita perfektigo, kaj per la rezultinta matureco de la eterna *volo*, ene de lia memkonscio.

„Permorta“ transiro el la *surtera* maniero de spertado en la *spiritsensan* perceptomanieron okazos ankaŭ *sen* via intenco, kaj tio, kio atendas vin „transe“, ekzistas, eĉ se vi *ne* kredas je „transa mondo“.

Sed al via eterna *volo* estas donita granda *potenco*, ĉar vi estas kapabla difini vian pluan sorton en esenca grado per antaŭa laboro tie ĉi sur la *fizike* perceptebla flanko de la mondo.

Antaŭkondiĉo estas respondecokonscia *konduto*, ĉiam orientita al la alta spirita celo, kiu fariĝas atingebla nur en la malegoisma *amo* al ĉio vivanta.

Sur la „alia flanko“ de la mondo, – tie, kie estas perceptate nur per *spiritaj* sensoj, – regas ne nur la „ĝojego de la beatuloj“. –

Tie ekzistas vere ankaŭ regnoj de *turmento* kaj *malespero*, de konsumanta *pento*, kaj de la *deziro al memneniigo*, kvankam tiu deziro neniam povas esti plenumata ...

Tra *tiuj* regnoj nepre devas iri ĉiuj, kiuj tie ĉi surtere ne plenumas la leĝon, kiu postulas de ĉiu tera homo *amon* al si mem kaj al ĉiuj kunestaĵoj.

Tiu „amo“ estas *tre* malproksima de ĉiu speco de sentimentala entuziasmo kaj de ĉiu troemociemo.

La *amo* postulita de spirita leĝo kaj tie ĉi priparolata estas la plej alta kaj plej forta *jesado de si mem kaj de la kosmo*, tiel ke la homo tute pleniĝinta de ĝi sentas en si mem kaj en ĉiu kunestaĵo nur tion *pozitivan*, tion *volitan de la spirito*, eĉ tiam, kiam li estas devigata *defendi sin* plej akre kontraŭ la samtempe efikantaj *negativaj* fortoj de la sama fenomeno. – –

Plej gravan rompon de la spirita leĝo tie ĉi priparolata faras ĉiuj, kiuj surtere mortigas sin mem por ial fuĝi malkuraĝe el la tera ekzisto kaj ties postuloj.

Tiu ago krome estas *sensenca* kaj *celmaltaŭga*, ĉar la memmortigito trovas ne la serĉitan liberigon, sed miloble pli turmentan kateniĝon en vere ne deziritaj konsciostatoj, el kiuj dum eonoj li ne povas eskapi.

Certa konsolo por la postrestintoj kuŝas en la fakto, ke la plej multaj memmortigoj estas farataj de homoj, kies konscio en la decida momento estas patologie mallumigita, tiel ke la terura ago negativa kontraŭ la propra vivo okazas en stato, kiun oni povas nomi *spontanee estiĝanta frenezo*, eĉ se tiu stato estis ekde antaŭ longe preparata per senrespondeca „*ludado*“ ĉirkaŭ la penso pri la *ebleco* de memmortigo.

Kvankam en tiu okazo murdinto kaj murdito montriĝis en *unu* persono, la murdo estis la faro de *penso* fariĝinta superpotenca, kiun la viktimo vivigis per siaj propraj fortoj tiom longe, ĝis tiu penso englutis lin. –

En tiu okazo la detruinto de sia tera korpo ne respondecas pri la ago de *murdo*, sed la spirita leĝo postulas de li *ekvilibrigan kompensadon de la tuta*

malĝusta pensado kaj agado, el kiu fine rezultis la freneza faro. –

Tiu kompensado pleje estas atingebla nur per la eltenado de dua enkarniĝo en la animalhoma korpo sur la tero.

Tie ĉi temas pri unu el la *esceptaj okazoj*, en kiuj tio nomata „reenkarniĝo“ *povas* okazi, dum ĉe *laŭleĝa* paso de la tera homa vivo, t.e. *per* ĝia plenumita paso, reenkarniĝo fariĝas neebla por ĉiam.

Kvankam la utiligado de la tera vivo por prepari sin al transmortaj statoj estas de plej granda graveco, vi tamen tute ne opiniu, ke vi devas vivi sur tiu ĉi tero vivon, en kiu vi timeme zorgas pri sekure certigita „savo de la animo“, kiel malmultfidema „sanktulo“, unu el tiuj egoistoj je la koro, kiuj ege timas ĉiun „pekon“, sed interne triumfante kredas esti certa pri la „kondamno de la malbona mondo“.

Tia teniĝo en via vivo kun plena certeco igus vin alveni en unu el la trompaj „bordoregnoj“ spiritaj, kiujn formis homa iluziado, sen scii pri sia propra kreinteco.

Vivo de fidela *plenumado de devoj*, plena de *amo* al ĉio vivanta, plena de strebado al bonkoreco kaj veramo, al *ordo en via volado* kaj al *nobligo de viaj ĝojoj*, – vivo plena de gaja *fido* pri la definitiva plenumiĝo de via plej alta kaj sublima sopiro, – ĉiutempe estos por vi *la plej bona vivo* tie ĉi

tempe estos por vi *la plej bona vivo* tie ĉi surtere, precipe kiam vi samtempe penas lerni *tion*, kion mi en tiu ĉi traktaĵo nomas „*la arto de mortado*“.

Krome ekzistas ankaŭ aparta vojo alta, pri kiu mi jam parolis alialoke, sed antaŭ ol vi formis vian vivon tiel, kiel mia konsilo vin instruas formi ĝin, vi apenaŭ povos paŝi antaŭen sur tiu pado...

Kiu volas ekiri sur tiun vojon, tiu devas esti libera de ĉio, kio povus malhelpi lian sekuran paŝadon.

Senkuraĝa, grumblema hipokriteco estas tiom malaprobinda kiom la vanta gesto de „neado de la mondo“.

Ne al ĉiuj aperos jam irebla la vojo, sur kiu la homo povas atingi, ke lia „*Dio*“ naskiĝas en li, tamen ĉiu almenaŭ *sciu* pri tiu ĉi vojo, – ĉiu preparu sin ankaŭ por ekiri ĝin jam dum sia surtera vivo, se iel eble.

Al multaj eble mankas la forto kaj persisto tie necesaj, sed ankaŭ ĉiuj *spiritaj* fortoj kreskas *per ilia uzado*, kaj *persisteco* doniĝas ankaŭ ĉi tie nur al tiuj, kiuj dediĉas al iu agado sian tutan *amon*. – –

Ĉio, kio sur tiu ĉi *fizike* perceptebla flanko de la mondo estas pensata, sentata kaj farata, havas daŭran efikon sur la „*transan*“ mondon.

La fruktoj de ĉiuj faraĵoj estigitaj de homo *tie ĉi surtere* konserviĝas al li ĝis tre longe post la morto, eĉ se liaj faraĵoj servas surtere nur al *fizikaj* celoj.

Kondiĉe ke vi povas porti la moralan respondecon, la plej grava afero en ĉiu via agado tie ĉi surtere estas ne, *kion* vi faras, sed *kiel* vi faras ĝin. —

La plej malalta laboro sur la tero povas alfluigi al vi neimagitajn fortojn por via estonta vivo sur la *spirita* flanko de la mondo, se vi faras tion komisiitan al vi *kun plej fidela devoplenumado*, ĝoje kaj tiom bone kiom eble, kvazaŭ la ekzisto de la tuta universo dependus sole de la boneco de via laborrezulto ...

Pri *vi mem* estas respondeca sole nur *vi mem!*

En ĉio, kion vi pensas aŭ faras, — en ĉio, pri kio vi okupiĝas sur tiu ĉi *fiziksense* spertebla flanko de la mondo, — vi ĉiam estas la nekonscia kreanto de via estonta sorto en la mondo de *spiritsensa* perceptado. —

Kion vi tie ĉi surtere nomas via „*sorto*“, tio estas nur ridinde malgranda *parteto* de nemezurebla *tuto*, kaj se vi tie ĉi plendas kontraŭ via sorto, via malkontenteco eble estas komprenebla kaj certe ankaŭ *pardonebla* de homa vidpunkto, tamen vi egalas nur al infano, kiu malsaĝe postulas aferojn, kiuj hodiaŭ ankoraŭ ne *povas* esti donata al ĝi, ĉar ili

ĝin *damaĝus*, dum ĝi *estonte* disponos tion postulatan *en plej riĉa abundo* ...

Nur kiam vi atingis *altan* ŝtupon en la spirita mondo, vi povos *kompreni* vian sorton, kaj tiam vi ridetos, rememorante vian antaŭan juĝon. —

Tiam vi vidos, ke viaj plej bonaj intelektaj argumentoj, kiuj forlogis vin al via juĝo, estis sama nombro da *malsaĝaĵoj*, ĉar vi volis konkludi al la beleco de la floro kaj al la dolĉa delikateco de la frukto el la radikofibraĵo, kiun viaj manoj elfosis el la malhela grundo.

Nur tiu, kiu scias malligi sin el la malvastigaj imagobildoj neeviteble rezultintaj el lia *fiziksensa* perceptomaniero, grade eksentos iometon de la granda tuto, en kiu li radikas kaj al kiu li neniam povas pliproksimiĝi per la rimedoj de *fiziksensa* ekkonado ...

Ne estis vanta frazo, kiam pasintece scianto, preskaŭ superfortita de la brilo de tio de li vidita, trovis la vortojn:

„*Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.*“

Sed „*ami Dion*“ signifas: — tiom „*ami*“, esti tiom *volonte preta akcepti*, ĉiun *penon* kaj ĉiun *dolo-*

ron de la tero, kvazaŭ oni estus *volinta* kaj *aspirinta* ĉion ĉi ĝuste tia, kia ĝi eniras en nian vivon! –

„*Ami Dion*“ signifas: – *ami la teron* kaj *ĉion, kio vivas sur ĝi*, – *tia, kia ĝi estas*, – eĉ kiam ĝi estas kontraŭa al niaj *deziroj*! –

„*Ami Dion*“ signifas: – *ami sin mem*, kaj *pro si mem* preni sur sin ĉiun penon, kiu estas metata sur ni sur la longa kaj peniga vojo, kiu el eraro kaj konfuziĝo kondukas nin fine al *ni mem*, tiaj, kiaj ni *eterne estas en Dio*! – –

Post ĉio ĉi dirita, vi nun probable ankaŭ scias, kiel vi plej bone honoras viajn „mortintojn“, – tiujn, kiuj estis proksimaj al vi en la surtera vivo kaj eĉ hodiaŭ, kiel antaŭe, *ekzistas*, sed estante ne plu atingeblaj por via fiziksensa *perceptokapablo* ...

Vi nun scias, kiel vi povas plue *helpi* ilin, kaj kiel vi, kiam vi *mem* bezonas helpon, *ricevas* ĝin de ili.

Estas vere malĝusta entrepreno fondi „*spiritismajn rondojn*“, por ekinterrilati kun mortintoj.

Eĉ kondiĉe, ke ĉiuj partoprenantoj estas honestaj kaj ke ĉiu trompo, ankaŭ trompo *nekonscia*, estas evitata, vi ja havas tro *malgrandan* scion pri la fortoj manifestiĝantaj en tiaj „seancoj“, kaj vi ne kapblas trovi la *realajn* kaŭzintojn de la fenomenoj.

Eĉ ne tiam, kiam vi rifuzas ĉiun antaŭe formitan kredon kaj volas esplori, kio en la afero eble estas vera.

La fortoj, pri kiuj temas en *aŭtentikaj* spiritismaj manifestaĵoj, estas *plenaj de mensogo, kaprico kaj trompo*, – ĉiam pretaj *atentigi* pri si mem pere de via propra forto, sed malproksima de ili estas la preteco ŝanĝi sin en servemajn objektojn de esplorado ... (Tie ĉi mi kompreneble ne konsideras la multajn *eblecojn de trompo* fare de „*mediumoj*“ kaj *membroj de la seanco*.)

La manifestaĵoj, pri kiuj vi kredas, ke efikas en ili fortoj de la „*transa mondo*“, estas, kondiĉe ke nenia terhoma trompo estas farita, nenio alia ol la ludo de nevideblaj estaĵoj de ankoraŭ preskaŭ nekonata regiono de la *fizika* mondo. –

Veraj en la spirito „*vekiĝintoj*“, – kiuj, kiel homoj konsciaj pri la transa mondo, povas esti rigardataj jam kiel „*homoj en la transa mondo*“, kvankam ili ankoraŭ vivas en terhoma korpo sur la fiziksense perceptebla flanko de la mondo, – estas *kapablaj uzi* tiujn estaĵojn en unuopaj okazoj, same kiel en la ordinara vivo oni uzas iun atingeblan helpulon, sed certe neniu el tiuj veraj en la spirito vek-iĝintoj ekhavas la ideon kontribui al la amuzado de la partoprenantoj de spiritisma seanco, aŭ fari la eksperimentojn de esploristo „*interesaj*“ ...

Ankaŭ tie, kie oni havas la impreson, ke oni „sendube“ interriltas kun la entelekio de iama tera homo, la danĝero esti *trompata* de lemuraj estaĵoj tiom superas ĉiun probablecon de *aŭtentika* komunikiĝo, ke oni ne povas sufiĉe emfaze *averti* kontraŭ ekirado de ĉiu vojo, kiu kondukas al *iu ajn* „spiritisma“ fenomeno.

Kiu tie ĉi avertas vin, konas ĉiujn manifestaĵojn eblajn en la „spiritisma“ kampo, surbaze de propra, certigita kaj plej vasta sperto.

Li same konas ankaŭ tiun nevideblan fizikan intermondon, kiu estas la origina vivelemento de la „spiritismaj“ laŭsupozaj „spiritoj“, kaj li same scias uzi eventuale tiujn estaĵojn kaj ties fortojn, kiel oni uzas rajdoĉevalon aŭ spurhundon, se la cirkonstancoj tion postulas.

Al homo spirite aŭtoritata, tiuj estaĵoj servas kun siaj fortoj kiam li tion postulas, sen tio, ke li antaŭe devus uzi „mediumon“ aŭ aranĝi „spiritisman seancan“.

Li eniras en la sferojn de tiuj interaj estaĵoj kun la sama sekureco, kiel li konscie eniras en la pure *spiritajn* mondojn.

Sed *ne* estas *agrabla*, proksimiĝi al tiuj estaĵoj, kaj neniu, kiu kapablas uzi ilin laŭ sia volo, iam fä-

ros tion *sen neceso*, kaj farante ĝin li ĉiam devas superi senton de *naŭzo*.

Tiuj estaĵoj estas kompareblaj kun la meduzoj de sudaj maroj, sed, malsame al ili, *ne* estas *fizike* percepteblaj. En la plej multaj okazoj, en kiuj vi kredas esti en komuniĝo kun viaj „*mortintaj karuloj*“, vi interrilatiĝas kun tiuj estaĵoj kaj iliaj tamen pure *fizikaj fortoj*, – escepte, se *sole viaj propraj*, al vi nekonsciataj fortoj el la *sama* regiono, al kiu apartenas tiuj nevideblaj fizikaj estaĵoj, estigas ĉiujn manifestaĵojn, kaj vi nekonscie *mem* tiel ludas por vi fantoman teatron ...

Sed por via anima kaj korpa bonfarto, tiu neekonita memtrompo certe estas *malpli* fatala ol la *aŭtentika* kontakto kun la lemuraj estaĵoj ĉi tie priskribitaj, ĉar ili elsuĉas viajn fortojn kiel hirudoj, kaj nur helpe de la energioj eltiritaj *el vi* ili kapablas esti la laŭsupozajn „miraklojn“ de viaj „spiritismaj seancoj“.

Eĉ la plej senantaŭjuĝa esploristo, kiu staras fronte al tiuj fenomenoj *nur kiel observanto*, tute ne estas ŝirmita kontraŭ la forto de la polipaj brakoj ĉirkaŭvolvantaj lin el la nevidebla mondo.

Kiom ajn li opinias esti „super la situacio“, li tamen devas lasi eltiri el si siajn plej kaŝajn fortojn, sen eĉ nur suspekti la misuzon, kiun faras de li la

nevideblaj parazitoj de lia „mediumo“, kiuj katenas lian intereson. – –

La *vera* „interrilatiĝo“, – la sola *sekura* komuniĝo kun tiuj antaŭirintaj en la „transan mondon“, – okazas *sole en la interno*, en la „animo“, kaj estas pure *spirita*.

Via propra *spirita* „korpo“ estas via organo por percepti la „forpasintojn“. –

Ĉiu „trasentita“ *penso*, ĉiu *sento* plene trapenetranta vin, estas perceptata „sur la alia flanko“ kiel la parolata vorto tie ĉi en la fiziksensa mondo.

Sed, same, ankaŭ vi perceptas, – se vi estas „en la kvieto“ kaj sufiĉe sentemaj por tio, – la esprimadon fare de tiuj, kiuj jam spertas sin mem sur la *spirita* flanko de la mondo, en la formo de *pensoj* milleda mallaŭtaj kaj *sentoj* kvazaŭ de ekstere penetrantaj en vin, kiuj post kelka praktikado de via distingokapablo estas kun plena certeco apartigeblaj de „*propraj*“ pensoj kaj sentoj. –

Sed ankaŭ *aparte* de tio, pri kio vi eble *konsciigas*, ekzistas konstanta, *nekonscia* influa efiko, kaj tiumaniere vi ofte estas la „mediumo“ de antaŭirinto en *multe pli ĝusta* senco ol kiom tiel nomata „spiritisma mediumo“ iam *povus* esti, eĉ se „transmonduloj“ *volus* uzi ĝin ...

Se vi estus kutimiĝintaj observi la ĉiutagajn okazajojn de via vivo sobre, tamen atenteme pri tio mistera, vi tre ofte vidus vin agantaj konforme al amata „mortinto“, kvankam ne ekzistis en vi la plej eta konscia *intenco* agi tiel, kiel dezirus la forpasinto, se li ankoraŭ vivus en *fizike* perceptebla korpo. –

Aliaflanke, certe mirigus vin ankaŭ tio, ke sufiĉe ofte io okazas fare de fremduloj, kion oni povas rigardi kiel finfinan plenumiĝon de deziro arde karesita de mortinto dum la tempo de lia surtera vivo, sed tiam restinta neplenumita. – –

Sed ĉio ĉi estas multe malpli efekta ol dancanta aŭ ŝvebanta tablo, kies piedoj frapas „mesaĝojn“, aŭ ol la „materiiĝinta“ figuro, en kiu oni, hipnote katenita sen esti konscia pri tio, „kun plena certe-co“ ekkonas kaj aŭdas paroli mortinton, kvankam tio, kio staras antaŭ oni, estas nur speco de „okulta“ panoptika figuro.

Certe, la eksteraj trajtoj estas depruntitaj el la iama tera korpo de la mortinto, kaj eĉ la robo, la vesto festas sian ŝajnan releviĝon, – sed el tia figuro parolas vivaĵo, kiu plenigus vin de *hororo*, se vi povus subite vidi ĝin starantan apud vi en sia *vera* formo senigita je ĉiaj masko kaj vualo.

Homoj, kiuj neniam spertis *aŭtentikajn* kaj vere rimarkindajn spiritismajn fenomenojn, apenaŭ kom-

prenos, ke oni povas preni tiujn aferojn serioze, – sed bedaŭrinde tio ne malhelpas, ke la tiel nomata „spiritismo“ havas milionojn da kaŝaj kaj malkaŝaj anoj kaj ĉiam altiras novajn „konvertitojn“ en sian sferon de katenanta influo.

Kolosa literaturo, parte fantasta, parte pseŭdosciencia, pri spiritismaj teorio kaj praktiko ankoraŭ trovas febrajn legantojn, kaj rilate al la kredantoj oni devas diri, ke eĉ grandaj sciencaj graveco kaj reputacio akiritaj en aliaj kampoj tute ne protektas kontraŭ plej kruda trompo, – precipe tiam, se la morto de amata homo estigas la ardan *deziron* veni en kontakto kun la mortinto en iu ajn maniero ...

Doktora ĉapelo ne estas sufiĉa izolaĵo kontraŭ la hipnotaj influoj el la nevidebla sfero, kaj la talaroj de akademiaj rangoj bedaŭrinde estas tralasivaj kiel araneaĵo por la suĉiloj de nevideblaj fizikaj moluskoj.

Pro ĉiuj ĉi kaŭzoj mia averto probable apenaŭ estos superflua.

La tuta *fizika* kaj *spirita* kosmo estas *unueca tuto*, kvankam tiu tuto prezentiĝas *en tre diferencaj aspektoj*.

La vera *realo*, kiu estas malantaŭ la aspektoj, estis kaj estas malfermita ĉiutempe nur al *tre* malmultaj teraj homoj.

Ĝi estas alirebla nek por eksperimento nek por spekulativa pensado.

Kiel sur la *fiziksensa*, tiel sur la *spirita* flanko de la kosmo ekzistas plej diversaj specoj de *perceptomaniero*, kaj ĉio tiumaniere eniranta en la konscion sin prezentas kun la sama pretendo: – ke ĝi estas „*tio reala*“.

Preskaŭ ĉiuj estaĵoj, kiuj spertas sin en la kosmo, vidas nur *parton* de la realo, kaj eĉ tiun parton nur *kiel transformajon nekonscie kreitan de ili mem*.

Ankaŭ la vivo post la „morto“ de la fizika korpo estas difinita per *ŝango de la perceptomaniero*.

Oni sentas kaj spertas la saman *realon*, – sed en *spirita* perceptomaniero, ĉar kiam la unueca vivo-funkciaro de la tera korpo estingiĝis, la fizikaj sensoj ĉesas esti taŭgaj peradaj organoj por la spertado.

Sed la vivo estas *sense* perceptebla en *ĉiuj* siaj regionoj, kvankam la sensorganoj estas de tre diferencaj *specoj*. –

Por la tera homo, „morti“ estas nur proceso, kiu *neeviteble* rezultigas, ke oni lernas *konscie* uzi sensojn, kiuj antaŭe estis kaŝitaj *en la subkonscio* ...

Eĉ dum la surtera vivo tiuj spiritaj sensoj jam *ekzistas*, – plie, nur ili estas la kaŭzo, ke la homo povas ricevi el sia animalkorpa sensa perceptado impresojn, kiuj restas *nesperteblaj* por animalo eĉ

sur plej alta ŝtupo, kiom ajn la akreco de ĝiaj fizikaj sensoj eble superas tiun de la homo. – –

Nur en relative maloftaj apartaj kazoj fariĝas eble, ke la sensoj de la spirita „korpo“ de l' homo malfermiĝas jam dum tiu ĉi surtera vivo, kaj la kapablo uzi la spiritajn sensorganojn aperas neniam subite, sed ĉiam nur laŭ la maniero de iompostioma „vekigo“, kiu povas esti milde progresigata, sed neniuokaze perforte estigata per arbitraj rimedoj.

Kiu jam dum sia fiziksensa vivo kapabliĝis uzi siajn spiritajn sensojn, tiu havas la impreson, ke la diversaj, por li sperteblaj, malaltaj „mondoj“ de la unu sola *kaŭza mondo de la realo* estas kvazaŭ „enŝovitaj“ unu en la alian, tiel ke ofte povas esti malfacile al li, tuj distingi, kio apartenas al la regionoj de la fiziksensa, kaj kio al la regnoj de la spiritsensaj mondoj.

Nur la tre malmultaj homoj, al kiuj malfermiĝis el interne ankaŭ *la mondo de la kaŭzo*: – la „afero en si“, samtempe sentas la unu, lastfundan *realon*, per kiu estas estigata ĉiu spirita kaj ĉiu fiziksense perceptebla mondo.

Tiu ĉi pra-realo estas *la prafundo de ĉiu vivo*, indiferece ĉu tiu vivo venas al sensa spertado kaj memspertado en spirita aŭ fizika maniero. –

Sed la „homo“, egale ĉu li spertas sin en *spirita* formo aŭ en *animaleca tera korpo*, estas, vidate en la eterna realo:

Eterna vivo en la formo de *individua, konscia spertokapablo*.

Estante surtere difinita per la *fiziksensa perceptomaniero*, la eterna vivo, fariĝinte tute dependa de animaleca formo, trovas tre malfacile senti sin kiel individuan formitaĵon kaj samtempe tamen kiel koncentriĝan punkton de nemezurebla tuto: – de tuto, kiu konas en si neniun malplenaĵon kaj neniun disigon, kvankam ĝi perceptas sin en infinitoblaj aspektoj. –

Terligita imago tro multe dependas de la *ekstera ŝajno*, kiu konas ion *individuan* nur kiel ion *apartigatan* de io alia.

Sed en spirita *perceptomaniero* individueco estas *eterna manifestiĝa funkcio* ene de nedividebla tuto: – ne *disigo* en si mem, sed *manifestiĝo de propra mult-unuco*.

Estas ĉiam *la tuta, nedividebla vivo*, kiu en ĉiu el siaj senfine multaj individuaj memformitaĵoj sin spertas en difinita, unika aspekto ...

Pri la templo de la eterneco kaj la mondo de la spirito

Ni, kiuj surtere vivas kun vi la vivon de tiu ĉi tero kaj tamen samtempe venas por doni al vi sciigon pri la *spirito*, – ni vivas vere en *alia* mondo ol vi, kvankam ankaŭ ni staras kun ambaŭ piedoj firme sur tiu ĉi tero.

Eble ŝajnas al vi, ke ni estas tro malproksimaj de vi, tamen neniuj povus esti al vi pli proksima ol ni.

Certe, ni vivas ne nur en *via* mondo, sed ankaŭ en la eterna mondo de la pura, esenca *spirito*, – sed *via* mondo estas *trapenetrita* de la eterna mondo de l' spirito, kiel spongo kreskanta en la maro estas trapenetrita de la akvo de l' maro.

Vi certe ne povas percepti *per teraj sensoj* la puran, esencan spiritan mondon, en kiu ni vivas *spirite*.

Vi devas unue *kapabliĝi* por *spirita* perceptado, se vi volas *sperti* ion spiritan.

Eĉ tiam vi devos unue *superpaŝi* ĉiujn *malaltajn* spiritajn mondojn, antaŭ ol vi eniras en la internan regionon, el kiu venas la sciigo atinganta vin ĉi tie ...

Multaj el vi serĉas nin kaj kredas, ke ili povus tuj esti *unuigitaj kun ni*, se ili venus al niaj homaj

loĝejoj sur la tero. Sed eĉ se ili tiam efektive *trovas* nin tie, ili neniukaze „pliproksimiĝis“ al ni.–

Ili vidas nian teran korpon, aŭdas nian teran voĉon, kaj eble perceptas tion plej eksteran de nia ekstera tera vivo.

Ili tamen *ne* povas iri en nian „*templon*“, ĉar tiu situas sur la *spirita* flanko de la kaŭza mondo, kaj *ne* „je la deklivoj de Himalajo“.

Sed tie, en la kaŝaj solejoj de la plej alta montaro sur la tero, vivas depost pratempaj tagoj ĉiam kelkaj el niaj fratoj el la vivanta generacio: – viroj, kiuj superpaŝis ĉiun grandecon surtere atingeblan kaj nun restadas en nealirebla soleca loko, por teni libera de ŝutkovraĵo la padon, kiu devas resti irebla por ni aliaj, agantaj en la monda vivo, por ke ni povu plenumi la taskon surmetitan sur ni ...

Dum jarmiloj ni konstruis nian spiritan templon, kaj konstante ni plue konstruas, sen iam konstrui ĝin tute ĝisfine.

En ĉiu jarcento ni aldonas novajn kapelojn kaj altarojn, novajn kolonojn kaj pilastrojn – laŭ spirite difinita ritmo kaj laŭ la antaŭordiganta, saĝa plano kuŝanta en la fundamentoj de la templo.

Ĉiuj viaj temploj kaj altaroj sur la tero estas nur *spegulaj bildoj* de tiu spirite formita templo.

Pli aŭ malpli klare, – en pli aŭ malpli tordita formo, – oni povas ekkoni je ĉiuj ĝiaj teraj respegulaĵoj, kion de la ĝustmezureco kaj ornamo de nia alta *templo de la eterneco* la malnovaj arkitektoj sentis kaj, se ili estis veraj artistoj, vidis per alta intuicio. –

Tiu templo ne estas verko de la *penso*, kaj mi tie ĉi parolas ne nur en *simbola* maniero.

Ĝi ekzistas kiel ĉiam spiritsense perceptebla konstruaĵo el spirita substanco, kaj estas vidata de *spirite* perceptantaj entelekioj kiel firma strukturo tiel same, kiel estas vidataj de *vi* la temploj kaj alttegaj katedraloj sur la tero ...

En la spirita mondo ĉio estas sentata tiom same „palpebla“ kaj „reala“, kiom en via mondo de la fizikaj sensoj, kaj vi subfalis al granda trompiĝo, se vi kredas, ke tie ĉi estas troveblaj nur vagaj revoformitaĵoj. –

Ne temas tie ĉi pri vizioj, halucinoj aŭ aliamaniere memkreitaj imagoj, nek pri la apero de bildforma spertaro el subkonsciaj regionoj. –

Kio estas perceptata per la *spiritaj* sensoj, tio estas *samagrade* „objektive“ ĉeestanta, kiel tio perceptebla per la *fizikaj* sensoj de la *tera korpo*, kaj tial tio, kio estas perceptata *spiritsense*, eĉ en la *plej altaj* ŝtupoj de spirita memmanifestado, „objektive“

respondas al la formoj de la mondo de fiziksensa perceptado, kvankam kun ŝanĝoj kondiĉataj de la spirita perceptomaniero.

Ankaŭ en la *spirita* mondo ekzistas „landoj kaj maroj“, profundaj ravinoj kaj altaj montoj, firnoj kovritaj de eterna neĝo, kaj larĝaj, kvietaj valoj plenaj de ĉarmo kaj paco ...

Al kiu tio ŝajnas soni „tro terece“, tiu klarigu al si, ke ankaŭ liaj *fiziksensaj* perceptoj sur la tero estiĝas nur el specifaj *impresoj* kaŭzitaĵoj de eksteraj aferoj. Li tiam atentu, ke ĉiam temas nur pri fizik-sense percepteblaj efikoj de certaj *energioj*, tiel ke ĉiuj *nomoj*, kiujn ni donas al aferoj, propradire *fiksas nur certajn kompleksojn da stereotipe percepteblaj unuopaj impresoj*. – Ekzemple, la okulo ricevas la impreson: „*blanka*“, la mano sentas *malvarmon* kaj *certain konsistencon* de la tuŝata substanco, la orelo ricevas la impreson de *grinca bruoj*, kiam oni tretas sur la saman substancon, kaj poste la komplekso de tiuj perceptoj (al kiuj povas aldoniĝi kelkaj aliaj, ekz. la percepto de facila likvigebleco kaj de la kristala formo de la unuopaj eroj) estas nomata de ni „*neĝo*“.

Por kaŭzi la *fiziksensan* percepton de tiu komplekso da impresoj, certe la ekzisto de *fizikaj* impresostigiloj estas necesa; kontraŭe, la sama komplekso da impresoj fariĝas perceptebla por *spiritaj*

sensoj *nur tiam*, kiam *spiritaj* energioj kuniĝas por formi tiun impresokomplekson.

Ankaŭ sur la *spirita* flanko de la kaŭza mondo ekzistas „*spaco kaj tempo*“, „*kaŭzo kaj efiko*“, sed ni havas esence alian *rilaton* al ĉio ĉi, ol ni kutime havas sur la tero, en la fiziksensa vivo. –

Ĉio, kio estas spertata en la *spirita* mondo, havas la saman *realecon* kiel la aferoj de la *fiziksense* perceptebla mondo, sed povas atingi la *konscion* nur en *spirita* maniero.

Kio tiumaniere estas perceptata, tute ne estas *loke malproksima* de la fizika mondo, sed ĝi *ne plu* estas submetita al la leĝoj efikantaj en la fizika fenomenara mondo.

Aktiva *volo* kreskigas en la spirita mondo tion, kio servu al ni en la spirita korpo, kaj la sama volo kaŭzas, ke la matura frukto estas rikoltata sen peno.

Sed ni ne konas *animalojn* en la regiono de la spirita mondo, pri kiu estas parolate tie ĉi, kvankam la mondo de *puraj formoj* de animaleca fenomenaro certe ne mankas ĉi tie.

Sed ĉio, kio je la surtera homo apartenas al „*la animalo*“, estas tie ĉi perdinta sian *potencon* super ni, same kiel ĉio *malamika*, kio surtere kontraŭas nin en la fenomenara formo de l' animalo.

Kio en la spirita mondo manifestiĝas al ni en formoj, kiuj en plej alta beleco *respondas* al tiuj de

la *animaloj* sur la tero, havas *absolute nenion* komunan kun la animala naturo montriĝanta al ni sur la tero en animalaj formoj ...

Surtere, homoj, por *nutri* sin, eble *manĝas* la vian donon de animaloj, aliaj *evitas* ĝin, – tie ĉi en la *spiritsensa* vivo ne ekzistas alia „manĝo“ ol la spirittaj ekvivalentoj de teraj *plantofruktoj* kaj de la tera fenomeno de *vino* kaj *pano*.

(Estas apenaŭ necese diri, ke temas ĉi tie pri „pano“, kiu fariĝis sen bakforno, kaj pri „vino“, kiu vere ne „ebriigas“ ...)

Sed ankaŭ sur la *spirita* flanko de la kaŭza mondo „manĝo“ kaj „trinko“ estas la *spiritsensa* formo de *replenigo de forto*, same kiel ekzistas en la spirita vivo stato de refreŝigado, kiu estas komparebla kun la sana dormo de teraj laciĝintoj.

Ĉar sur la spirita flanko „manĝo“ kaj „trinko“ estas *produktoj* de la forto de l' volo, ankaŭ ilia *efiko* estas nur transformado de la sama forto en spirittaj elementojn, kaj tial okazas en la spirita korpo neniam eliminado, kiu surtere estas kondiĉata de la animala naturo.

Sed ĉio ĉi aperas al multaj el vi tro „sensa“, tro simila al la vivo sur la tero, ol ke ĝi povus trovi vian volonte pretan komprenon.

Tiel pensante, vi forgesas, ke ankaŭ sur la tero ĉiu sense kaptebla okazado ĉiam estas „simbolo“ de proceso, kiu por la sensoj restas *nekaptebla*.

Ĉiu vivo en la *fiziksensa* kaj en la *spirita* kosmo montriĝas kiel *movo*.

Kaj ĉiu movo estigas *formon*.

Ĉar ĉiu vivo ĉiam estas *la sama unu* vivo, ankaŭ ĉiu *formo* estas: *simbolo* respondanta al la sama *movo* en *ĉiuj* diversperceptaj regionoj de la kosmo.–

Spirita regno tia, kian *vi reve imagas* kaj kian oni dum jarmiloj ĉiam denove *instruis* vin reve imagi: *sen* formoj, *sen* simboloj – ekzistas *nenie*, escepte se oni kontentiĝas pri la malklaraj, nebulaj regnoj, kiuj en kelkaj *kapoj* estas rigardataj kiel „realo“.

La „senforma maro de la neformita Dieco“, pri kiu parolas la mistikuloj, estas *super ĉiu* ekzisto, sed unufoje perdiĝintaj en tiu maro, vi neniam plu retrovus vin.

El ĝi vi *eliris* por fariĝi *formo* kaj *manifestiĝo de via volo*, sed tio, kio transdonis vin al *individua* formiĝo, eterne devus ĉiun repuŝi kaj reĵetegi eksteren en la kosmon, se iu *povus* reveni en la senliman pra-maron.

Tre malproksimaj de tiu pra-marĉo estas la kompatindaj revuloj, kiuj trovis en sia subkonscio la kaŝan spertaron de foraj prauloj kaj denove traĝuis en si ties *nekapablon* por *individua* memspertado kiel laŭsupozan „spertadon de la Dieco“ ...

La plej interna lumomondo de spirita perceptado, el kiu ni alportas al vi sciigon, estas, laŭ sia *formo*, la verko de *ĉiuj*, kiuj kapablas sperti tiun ĉi spiritan mondon, kaj tamen ĉiu unuopa restas la formanto de sia *propra* spertado.

En la *komuneco* de voloefikado ĉiu unuopa volo ĉi tie strebas al la *sama* formiĝo.

Sed *por si mem* ĉiu unuopa volo tamen kreas, *ene* de nia komuneco, sian *propran* spertadon, kiu siaflanke ne ĝenas iun *alian* unuopan volon, ĉar ĝi neniam povus fariĝi *sperteblo* por *alia* unuopa volo, escepte per *interpenetrado*.

Kvankam la tuta formaro de la spiritsensa mondo estas samamane sentata „*reala*“ kiel la mondo de *fiziksensa* perceptado, tamen en la *spirita* mondo ne kontraŭstaras al nia volo iu el la *resistoj*, kiuj sur la tero malhelpas kaj limigas ĝin.

Se ni *volas*, ke io *estu*, tiam sufiĉas nia *volo*, por ke ĝi estiĝu ...

Ĝi *estiĝas*, – pli aŭ malpli frue, depende de la *forteco* de nia volo, – sed ĝi *estiĝas tia*, kia ni ĝin *volas*.

En la spirita mondo, sole la kreaĵ fortoj de la *vol* ekzistigas tion kio estas *volata*, kaj aliaflanke tio antaŭe *volita malaperas* sen iu spuro, tuj kiam la volo ĝin *neas*; do tie ĉi la potenco de la volo estas tre proksima al la nocio pri „ĉiopoveco“.

Nur la spirita mondo *komune volata* de ĉiuj, kiuj konscie partoprenas en la spertado tie ĉi priskribita, – mondo rezultinta el la komuna *spiritsensa ekkon*maniero, – ne povas esti ŝanĝata aŭ neniigata, same kiel la *fiziksense* perceptebla mondo.

Sed ekzistas ankaŭ *aliaj* mondoj de *spiritsensa* perceptomaniero: – mondoj de *malklara ekkon*ado kaj *misgvidita* volado.

Ili estas la mondoj de tiuj, kiuj eniris en la spiriton sen povi malligi sin el la firmaj katenoj de teraj ĥimeroj kaj pensoĉenoj.

Nekapabla levi sin plenkonscie al la *klarekkonaj altaĵoj* de la krea spirito, ĉiu el tiuj katenitoj kreas al si malaltan *spiritsensan mondon ŝajnan*, kiu konformas al la imagoj katenintaj lin jam dum lia surtera vivo, – sed la produkto de lia volo ne havas daŭran ekziston.

Tial, ke ĉiu volas *ion alian* ol aliulo, unu ĉiam detruas la verkon de la alia.

Tamen tiuj mondoj de iluzio konserviĝas *dum multaj jarmiloj*, se ili ŝuldas sian ekziston al *komunaj imagoj*, kiuj surtere estis karesataj kaj nutrataj per granda kredoforto dum longa tempo. –

Sed la nekonsciaj kreantoj de tiuj mondoj senĉese batalas kontraŭ siaj malamikoj: – kontraŭ ĉiuj voloforto kiuj volas atingi *alian* celon.

Vi ne scias, kiom da religia netoleremo, kiom da nacia malpaco, kaj kiom da aliaj kvereloj sur la tero estas nur *retroefikoj*, kaŭzita de furiozaj defendobataloj en la regnoj de iluzio, kiuj estis kreataj de la homo en la *malaltaj* regionoj de spiritsensa perceptomaniero ekde praa tempo. – –

Ĉio, kio sur la tero estas serioze *kredata* aŭ *volata*, estigas en la malaltaj regionoj de spiritsensa perceptado „mondon“, kiu konformas al tiu kredado aŭ volado kaj restas ekzistanta tiom longe, kiom tiu kredo aŭ volo ekzistas sur la tero kaj sendas kredantojn aŭ volantojn en tiujn regionojn.

Ĉio, kio sur la tero *interbatalas*, estas reciproke malamika ankaŭ en la mondo de ŝajna plenumiĝo, kiun ĝi nesciante kreas al si en tiuj *spiritsensaj* regionoj, kaj tio, kio *spirite* interfuriozas tie, efikas

per siaj malamikaj fortoj returne sur la teran homaron. –

Tiu interefikado nutras malamikecon kaj malamon sur ambaŭ flankoj.

Sed ĉiuj ĉi apartaj mondoj, – tiuj spiritaj „bordoregnoj“ – iam *pereos*, eĉ se ilia ekzistado ŝajnas certigita por eonoj.

Eternan ekziston en la spirito havas nur *tiu* spirita mondoformo, kiu originas el *eterne unuigita kolektiva volo* tralumita de ekkono, volo, kiu povas esti ŝanĝata de *nenio*, ĉar en ĝi la volo de memjesado de ĉiuj unuopuloj estas *identa* kun la eterna *amo*, kiu estas la prafundo de nepereonta esto ...

Ni, kiuj vivas en la *eterna* mondo, konsciaj pri nia eterneco, – *ne* kontraŭas malamike *iun* volodirekton aŭ *iun* kredon, kiom ajn absurda aŭ malaprobinda ĝi aperas al ni.

Ni ne bezonas protekti nian spiritan mondon kontraŭ iuj malamikoj, ĉar tiuj, kiuj *povus* esti malamikaj kontraŭ ni, ne kapablas atingi la mondon, en kiuj ni spirite vivas.

Kion ajn ili aŭdis pri ni, – kiel ajn ilia supozado aŭ opiniado juĝas nin, – ili tamen ne scias, pri kio ni donas ateston, kaj ili ne povos ekscii ĝin tiom longe, kiom ilia spirita blindeco ne estas forigita ...

Tial ilia *volo* al ni malamika direktiĝus nur kontraŭ *bildo*, kiun ili *mem* kreis al si, – neniam kontraŭ *ni mem* kaj *nian* spiritan mondon. –

Sed ni vidas, nemezureble profunde sub la firnoaltaĵoj, kiuj estas al ni hejmo en la spirito, la *pereemajn* spiritajn mondojn, kiujn kreis al si *tersklavigita* volo, kaj ni estas ĉiam preta liberigi el ili tion, kio *volas* lasi liberigi sin.

Ni ne *povas* malligi iun, kiu ne *puravole*, estante *vera antaŭ si mem* en sia plejinterno, postulas de si tion *plej altan* kaj *plej luman* kaj neskueble fidas al la helpo de la eterna *amo*.

Sufiĉe malofta estas la volo, kiu manifestiĝas tiumaniere, – sufiĉe malofta la ekkono, ke nur la elĉerpado de la *propra* forto donas la rajton pri helpo ...

Tamen *ekzistas* tia volo kaj tia ekkono.

Kvankam iufoje atingas nin voko, kiu montriĝas kiel malkuraĝa memkompato en la fuĝo for de la propraj devoj, ni ja aŭdas *aliajn* vokantojn, kiuj vere jam *plenumis* ĉion, kio postulas plenumadon per *propra* forto.

Sole ilin ni povas liberigi el la regionoj de tempa iluzio.

Antaŭ ĉio alia, kion ni povas fari en la spirito, estas sankta al ni tiu liberiga agado.

Ni ne konas *pli grandan* ĝojon, ol helpi iun el tiuj, kiuj penas superpaŝi *sin mem*, leviĝi el la tenebro supren al la *lumo* ...

La aliaj devas iri vojon, pri kiu ne estu parolate tie ĉi.

Ankaŭ ili ekkonas pli aŭ malpli frue, ke ilia spirita mondo kreita de ili mem *ne* estas la mondo de daŭra plenumiĝo.

Amara kaj malmola estas tiu ekkono, kaj dorna la pado, kiu sola donas esperon iam atingi la lumon.

Eonoj povas sekvi eonojn, antaŭ ol la serĉanto atingas la unuan el la ŝtupoj, kiuj kondukas lin supren al la eterna *lumo*, – al *daŭra* plenumiĝo de lia sopiro. – al la *prafundo* de lia *esto*. – – –

Ĉion, kion mi tie ĉi komunikas, oni eble povus rigardi kiel strangajn maldormajn sonĝojn de „mistikulo“ premita de liaj fantazioj, kaj mi ne faras ri-proĉon al iu homo de tiu ĉi jarcento, se li tiumanie-re provas defendi sin kontraŭ miaj vortoj.

Sed en *via* intereso mi konsilas al vi rigardi tiujn komunikojn prefere kiel raporton de viro, kiu havas iomon por diri al vi pri malproksimaj landoj, al kiuj vi ankoraŭ ne povis vojaĝi.

Kelkaj el vi eble ĉagreniĝas pro tio, ke ili tie ĉi aŭdas *ion alian* ol ili ĝis nun aŭdis de tiuj, kiuj

trompiĝinte asertis, ke ili kun maldormaj internaj sensoj eniris en la sferojn de spiritaĵoj.

Ĉi tie oni pripensu, ke kelkaj homoj kun aparta natura kapablo kaj post certa instruado eble povas eniri en la *plej malaltajn* kaj *plej eksterajn* regionojn de la nemezurebla regno de spiritsensa perceptado, sed ke povas eniri en la klarluman *plej internan* regionon de la *esenca spirito* neniu, kiu ne apartenas al la vokitaj gardantoj de la sekreta spirita „heredaĵo“ de la tera homaro.

Ankaŭ la malmultaj, al kiuj estas konfidita tiu heredaĵo kaj kiuj estis naskataj kun tiu vokiteco, ĉiutempe devis, sub alta gvidado, unue akiri sufiĉe grandajn spiritan scion kaj praktikan kapablecon, antaŭ ol oni, post plurjara provado, finfine trovis ilin vere „elprovitaj“ ...

Sed la „viziuloj“, kiuj kredas povi prezenti al vi „rezultojn de esplorado sur pli altaj ebenoj“, kvazaŭ temus pri regionoj malfermitaj al scienca sondado, *senescepte* estas homoj, por kiuj *plejfavoraokaze* fariĝis alirebla iu aŭ alia el la *malaltaj* sferoj, kiujn mi nomis „bordoregnoj“ de la mondo de spiritsensa perceptado.

Certe, iu aŭ alia el la trompiĝintoj eble raportas bonafide pri aferoj, kiujn li vere vidis en tia „bordoregno“, aŭ kiujn eĉ montris al li transmondulo, kiu

ŝajnis sin al li „majstro“, ebriigite de trompa „certeco“. –

Pli malofta ol vi supozas estas vere *aŭtentika* sciigo el nia mondo en la spirita universo.

Tiuj, al kiuj tia sciigo foje venis, tenis ĝin tre sekrete kaj timis, ke ili profanus sanktaĵon, malkaŝante al la amaso tion, kion ili eksciis.

Aŭtentika sciigo *ĉiam* venis nur de ni malmultaj, la *solaj*, kiuj ĝin doni *povis*.

Sed oni donis tiajn sciigojn nur en sekreto, kaj donis ilin nur al unuopuloj, kiuj dumtage kaj dumnokte klopodis atingi lumiĝon.

Sed ĉe tiu maniero de disdonado de semeroj la rikolto de fruktoj restis tro malabunda, kaj tial nun estu donata al la *tuta mondo* tio, kio el nia sperto-bazita scio estas komunikebla en homlingvaj vortoj.

Mi ne paŝas antaŭ vin kiel instruanto por postuli, ke oni donu al mi pli grandan mezuron da konfido, ol kiom estas ĝenerale kutime inter honestaj homoj.

La komunikon, kiun mi tie ĉi donas al vi per mia vorto, mi donas el mia *eterna spirita naturo*, kaj mi tie ĉi atestas spiritan mondon, en kiu mi vivas kun miaj fratoj en la spirito, dum mi *samtempe* vivas kun vi la vivon sur tiu ĉi tero, estante ligita al ĉiuj teraj devoj kaj tre malproksima de la deziro eviti ilin.

Mi donas al vi ateston ne sole pri mia propra ekkonado, sed skribas ĉiun vorton mian en konstanta spirita akordo kun la ekkonado de tiuj, kiuj estas al mi fratoj en la spirito, sacerdotoj unuigitaj kun mi en la templo de la eterneco.

Ĉiu leganto de tiuj ĉi vortoj tute ignoru la eksteran personon de tiu skribinta ilin, kaj nur demandu sin *en sia propra koro*, ĉu en ĝi estas trovebla akordo kun tio donita ĉi tie.

La *konsento de la koro* komence estas perceptata nur *milde kaj mallaŭte*, se la leganto ankoraŭ vivas en pensoj kaj imagoj influataj de malaltaj limregnoj de la spiritsensa perceptomaniero.

Ju pli alten super tiun influzonon li jam leviĝis, des pli klare li sentos en sia plejinterno la verecon de miaj vortoj.

Sed kiu estas *kunkreanto*, kvankam nekonscie, de malaltaj mondoj en la spiritsensa limregiono, kaj sekve estas plene influata de la retroefiko de la imagoj kreitaj de li mem, tiu probable ne sentos la deziron liberigi sin el sia memkateniteco.

Simile, ĉiuj rigardantaj la regnon de abstrakta *pensado* kiel la regnon de la *spirito*, havos nur rideton por tio, ke laŭdire ekzistas, en la spirito, mondo de eterna *plenumiĝo*, kiu enhavas tiom multajn elementojn de la *fizika* fenomenaj mondo.

Ŝajnas tro malfacile atingebla la ekkono, ke la tuta *fiziksense* perceptebla mondo, en la plej grandaj kiel en la plej malgrandaj aferoj, estas sekundara formitaĵo laŭ la modelo de *spiritsensaj* fenomenaj mondoj ...

Sekve oni opinios sin rajtigita senprove deklari, ke ĉio, kion mi diras ĉi tie, apartenas al la regno de fabloj kaj de revoj de la homa espero.

Kaj tamen, tia erara juĝo ŝanĝas absolute nenion je la ekzistanta strukturo de la realo.

Se ne estus multjarmila *superstiĉo*, ke la spirita realo devas esti konkludebla per la mekanismo de logike ĝusta pensado, tiam la realo de mi atestita estus konkludita jam antaŭ longe kaj ne plu la objekto de iu dubo.

Multe pli proksimaj al la vero estas *la kredinstruoj de la malnovaj religiosistemoj*, ĉar en ilia bildotrezoro konserviĝis ĝis hodiaŭ multo, kiu klare portas la signon de *homoj vere konsciaj en la transa mondo*.

Kiu hodiaŭ scias *interpreti* la lingvon de tiuj bildaj instruoj, al tiu mi ne diras ion fremdan, instruante, ke ne ekzistas alia, vere *eterna* „beateco“ por la daŭranta homa spirito, ol en la plej interna lungenerita mondo de la spirito kun ĝia senlima abundo da *formoj kaj prasimboloj*, – kun ĝiaj senfi-

ne multaj ebloj de *plenumiĝo* de plej alta kaj pura volado ...

Tiuj, laŭ kies koncepto la memsentado de la homo *finiĝas* en la momento de la morto de lia tera korpo, devos, nur *post* tiu morto, lasi la *sperton* korrekta ilian gravsekvan eraron.

Ili probable ne tre alte taksas la „*konsenton de la koro*“, kaj spite de ilia sagaceco ili ne vidas, ke ili mure baras al si mem la solan vojon, kiu povus konduki ilin jam *nun*, kaj tie ĉi surtere, al klara ekkonado.

Certe ne estas la plej malbonaj tiuj, kiuj, pro laŭsupoze bonaj kaŭzoj, opinias la morton de la fizika korpo identa kun *definitiva neniigo de la konscio*, – sed malfacile estas tiri ilin el ilia eraro, ĉar la ekstera ŝajno tenas ilin katenitaj, tiel ke ili rigardas la nedubeblan ekkonon de *tera* pereonteco kiel konvinkan pruvon ankaŭ en sfero, kiu obeas tute *aliajn* leĝojn ...

Certe la *fiziksense* perceptebla homo estas definitive *neniigita*, tuj kiam lia tera korpo mortis.

Kio plue ekzistas, tio estas la eterna, el si mem formita *volo*, tia, kia ĝi kreis al si *esprimon en* la korpo kaj *per* ĝiaj fortoj ĝis ties morto, kaj la *konscio* ekkonanta sin mem en tiu voloformo, tia, kia ĝi

sentis sin ankaŭ fiziksense eĉ dum la lastaj momentoj de klara sentado en la korpo.

Tiuj du, *volo* kaj *konscio*, vere sufiĉas por nomi la sekvantan staton „*plua vivado*“, ĉar ankaŭ la *tera* vivo estas nur sense perceptebla „*eksterigado*“ de la eterna *volo* difinita per sia memformado kaj tiel difinanta sian *memkonscion*.

Sed prudenta pensado prave kontraŭas la supozon, ke tiu volo, aŭ la memkonscio difinita per la akirita voloformo, estas, tuj post la morto de la tera korpo, levata en staton de „eterna beateco“ aŭ ĵetata malsupren en „eternan turmenton“.

Tio nepereonta, kio antaŭe kreis al si esprimon en tera korpo, tute ne „forleviĝas“ al nubaj altaĵoj aŭ „al la steloj“.

Okazas nur *ŝanĝo de la perceptomaniero*, kaj la konscio de la eterna volo, *malligita* de la *tera* perceptomaniero, nun kapabliĝas percepti per la sensoorganoj de sia *spirita* korpo, per kiu sola ĝi akiris jam dum la surtera vivo *spiritan* sperton, ĉu riĉan, ĉu malgrandan.

Kio *komence* estas perceptata, post kiam la fizikaj sensoorganoj estis forprenataj disde la konscio, tion mi jam detale priskribis en la *unua* traktaĵo de tiu ĉi libro.

La *perceptomaniero* estas, spite de ĉiuj ĝiaj variaĵoj, la *sama* en la *plej malaltaj* el la *spiritsense* percepteblaj mondoj, kiel en la *plej alta, plej interna* mondo de la spirito.

Diferencaj estas nur la *formitaĵoj* perceptataj, – diferenca estas la klareco de individua ekkonado ene de la regiono de tiu perceptomaniero.

Ju pli alta tiu ĉi ekkonado, des pli pure la jam kristalklare *formita* eterna volo en la memkonscio sentas sin kiel *kreanto* de la fenomenaj formoj el spirita substanco, – des pli lumklare riveliĝas al la konscio la eterna *realo*, sur kiu baziĝas ĉiu estotformo.

Al io „*senforma*“ strebas nur *neklare* formita volo ankoraŭ *ne certa* pri si mem. –

Sed *klarigita*, discipline en si mem *firmigita* volo, kiu ampleksas en si *ordon* laŭ *mezuro* kaj *nombro*, sur ĉiu ŝtupo de sia efikado necese kondukas al *formiĝo* en *fenomenaj formoj*, kaj la plej alta feliĉo de la volo konsistas en tio, ke ĝi elformas sian kreitaĵon ĝis ties interne baziĝanta *perfekteco*

...

Certe, ĉiu vere krea *artista* kaj ankaŭ aliaj „*kreantoj*“ sur la tero konas foran *rebrilon* de tiu feliĉo, sed nur sur la spirita flanko de la universo trovas *plenumiĝon* tio, kio surtere estis *antaŭsent*o.

Tial la *edukado de la volo*, per la uzado de ĝia propra impulso al formiĝo, estas la *unua kaj plej necesa* spirita instruado kaj la unua paŝo sur la vojo, kiu kondukas al la eterna mondo en la plejinterno de la spirito.

Ni estas vere pli proksimaj al vi, ol kiom vi pensas, – ni estas ĉe vi, kie ajn vi estas, ĉar tio *spirita* en vi havas *sian eternan eston* en la spirita mondo malfermita al ni, kvankam vi ankoraŭ ne kapablas senti vian identecon kun tiu via eterna, spirita esto.

Tiun senton de identeco vi povas atingi nur tiam, kiam via eterna volo pure kaj klare *perfektigis* sin en ordo kaj laŭleĝeco.

Nur tiu, kiu senĉese labore klopodas eltiri sin el la densa krepuska nebulaĵo, en kiu malklaraj nocioj pri spiritaj aferoj igas lin erarvagadi, iam povos atingi la klarecon de spirita lumo, kiu estas al ni spirada elemento de vivo.

Tiam la serĉanto sciiĝos, ke la mil „*demandoj*“, kiujn li vane metis al si jam en la *komenco* de sia vojo, povas ricevi sian absolute kontentigan *respon*don nur je la *celo* de tiu vojo. –

Pro tio ĉiuj gvidantoj al la spirita lumo unue devas meti la postulon pri la „*fido*“*, kiu, estante vivanta forto, ekigas *la impulson al antaŭenirado*.

* Rim. de la tradukinto: En tiu ĉi traduko la vorto „fido“ estas uzata laŭ la Zamen-

Je la komenco de la vojo al la templo de la eterneco devas stari la „*fido*“, ĉar „*scio*“ povas doniĝi nur al *tiu*, kiu atingis en si la *finan celon* de la vojo.

Kiu ne havas la „*fidon*“, ke li iam atingos tiun celon, tiu certe ne prenos sur sin la *penon*, kiun la vojo postulas de li, kaj kiu time evitas tiun penon, tiu *neniuokaze* povos akiri, jam tie ĉi sur la tero, „*scion*“ certan pri spiritaj aferoj.

Sed tia „*scio*“ povas al vi *doniĝi*, eĉ se vi ne kapblas, jam dum via surtera vivo, sperti vin mem libere en la plej altaj regnoj de la spirito.

Kiu fariĝis „*sciinto*“ pri la aferoj de la *spirito*, tiu akiris vere *pli*, ol se li posedus la scion de ĉiuj sciencoj de la tero ...

Li *ekkonos sin mem* en ni, kaj, unuigite kun ni, li trovos sian eternan hejmon: la regnon de la lumo.

Tamen oni tute ne kredu, ke *spirita* scio estas akirebla nur por tiuj, kiuj orgojle kredas esti supera al ĉio, kion „en la lernejoj instruas filozofoj“.

Certe, *spirita* scio ne povas esti *akirata* per intelekta konkludado, sed ĝi povas *helpi* al la intelekto *konklude trovi* ne malmultan novan ...

Scio *spirita* ne estas akirebla en la sama maniero kiel tera scienca scio, sed, aliaflanke, ankaŭ *intelek-*

hofa difino, ne en la senco donita al ĝi de la tradukintoj de la Londona Nova Testamento. – Kp: Rim. en Plena Ilustrita Vortaro, „fido“ 3.

ta ekkono de *teraj* interligitecoj ne povas esti akirata alie ol per *intelekta laboro*.

Kion la tera intelekto ekkonas per tersensa esplorado, tio neniam povas esti objekto de spirit-sensa esplormaniero, kaj neniam povas ekzisti *malakordo* inter tiuj du manieroj de ekkonado, escepte se ĝi estis kaŭzata nur de nesufiĉa *kapablo* de ekkono.

Nur tie, kie ĉio „elpensebla“ *finiĝas*, ekkonado *per la spirita perceptomaniero* fariĝas ebla: – *transe* de ĉiu terhoma scienco.

Tio sola reala

Mi esperas, ke vi jam komencis eksenti iometon de la sekreto de la *kaŭza mondo* eterne generanta, eterne naskanta, kiu manifestiĝas en ĉiuj regnoj de perceptado, en abundego da infinitoblaj fenomenoj

...

Aŭ ĉu via interna sentado ankoraŭ estas tro malakra, ĉar vi ne kutimis akriĝi ĝin?

Tiukaze vi eble apenaŭ sentas iom de la *mistero*, kiu estu senvualigata al vi per miaj vortoj, aŭ vi interpretas miajn vortojn tiel, kiel ili ne volas esti interpretataj. –

Sed mi volas, ke vi fariĝu „*vidkapabla*“, por ke vi ne eniru en la regnon de la spirito kiel „*blindigit*to“, kiam venas la tago, en kiu vi *devas* eniri en ĝin.

„*Avidyâ*“, t.e.: *nesciado*, estas prave nomata „*kulpo*“ fare de orienta saĝo, ĉar nur via propra *vol*o povas bari al vi la pordon al ekkonado. — —

Vi jam plurfoje aŭdis, ke inter via mondo de *fiziksensa* perceptado kaj la mondo de la *spirito* estas nur barilo, kiu apartigas du diferencajn specojn de *perceptokapablo*.

Mi intence ofte ripetis min, kaj ankaŭ estonte devos ripeti min, por ke tiu ĉi fundamenta veraĵo eniĝu en vian konscion tiom profunde kiom eble.

Ankaŭ tie ĉi mi devas revoki en vian memoron, ke *tio reala* ĉiam restas *tio sama unu kaŭzanta*, kvankam ĝi estas plejdiversmaniere *perceptata* en la *fizikaj* aŭ *spiritaj* fenomenaj mondoj.

Filozofia pensado eksentetis de fore tion unu „realan“ kaj nomis ĝin: „la afero *en si*“.

Sed ĝin *atingi* estas absolute *neeble* eĉ al la plej subtila kaj plej sagaca spekulativa pensado filozofia.

Ĝi estas ekkaptata nur en *praktika spertado*, kaj nur elprovitaj majstroj de praantikva, kaŝa ekkon-

maniero estas vere *kapablaj* por tiu praktika spertado.

Kaj *sole* ili kapablas, *gvidi* al tiu praktika spertado siajn posteulojn, kiuj estis naskataj kaj elektataj kiel tiaj.

Tiel ankaŭ mi iam atingis tion, kio ĉi tie estis atingebla.

Kiu do krom ni povus tie ĉi surtere montri al vi – almenaŭ per indiko kiun vortoj de homa lingvo povas doni – *tion unu realan*, kio estas la fina *kaŭzo* de *ĉia* kaj *ĉiu* fenomeno?

Mi volas provi, ĉu mi sukcesos, – sed en tiu ĉi provo mi devas urĝe peti helpon de via propra plej interna *sentado*, ĉar nur se tio, kio *en vi* estas spirita, povas unuigi sin kun mia instrua parolo, vi *interne ekkonos* la veron.

Viaj okuloj estas ankoraŭ blindigitaj de la brilo de *pasema* lumo, kiu certe *povas* blindigi la okulojn.

Vi unue devas lerni „*vidi*“.

Via okulo devas *liberiĝi*, tiel ke ĝi povas vidi tion, kion vidi ĝi *volas*, kaj ne plu estas *devigita* vidi *nur tion*, kion la plej multaj homoj *sole* povas vidi.

Via okulo devas lerni vidi *internen*, same kiel ĝis nun ĝi vidas nur *eksteren*.

Sed ne temas nur pri alia „*vidado*“, sed via tuta *sentado* devas renoviĝi.

Via propra „*sento de ekzisto*“ devas malligi sin el la katenoj ankoraŭ ĉirkaŭligantaj ĝin, se vi volas *senti*, kun neŝancebla certeco, tion solan „*realan*“, kio estas la *kaŭzo* de ĉiu fenomeno.

Magiaj fadenoj tratiriĝas ankaŭ tra la ekstera, *fiziksense* perceptebla mondo, kaj se vi persiste penas lerni vidi *internen*, vi baldaŭ scios *distingi* la *fenomenan formon* de tiu ĉi ekstera mondo disde *tio kaŭzanta*, kio manifestiĝas en ĝi.

Vi faros la surprizan malkovron, ke tio sola *reala* de la tuta fenomenaj mondo estas ekkonebla ankaŭ en la sfero de *fiziksensa* perceptomaniero: en la formo de la *kaŝaj spiritaj elementoj de la praesto*, kiuj sufiĉe ofte estis *spertataj* de homoj, sed kies ekzistado tamen estas neata de multaj, ĉar *ilia* sperto scias nenion pri ili...

Kiu *spertis* tion ĉi tie celitan, tiun la dubo de aliuoj ne plu povas konfuzi, kaj lia propra spertado gardos lin kontraŭ la eraro, ke li egaligas tiujn ĉi fortojn kun *tiuj* originantaj el la *nevidebla* sfero de la *fizika* naturo, kvankam *ambaŭkaze* oni ĝenerale kutimas paroli pri „*mistikaj*“, „*supernaturaj*“ aŭ „*okultaj*“ fortoj.

La tuta *fizika* fenomenaj mondo, kiu ĉirkaŭas vin, – inkluzive de via propra korpo, – baziĝas sur la efikado de la *spiritaj fortoj* el la *praesto* kaŝitaj al la teraj sensoj, kaj ĉiuj *spiritaj* mondoj same estas fenomenaj formoj de tiuj kaŭzaj fortoj.

Dependas de la perceptomaniero, ĉu oni sentas la efikadon de tiuj fortoj kiel *fizikan* aŭ *spiritan* „mondon“.

Vi nun certe komprenas, ke la „*transa mondo*“ estas ne esence alia mondo, sed nur la rezulto de nova, al vi ankoraŭ nekonata, *alia maniero percepti* la efikadon de la *samaj* kaŝaj praesto-elementoj, kies efikadan rezulton vi surtere lernis rigardi kiel „tiuĉiflankan mondon“. –

Certe, via konscio ne estas kreanto de la *realo*, ĉar ĝi estas *mem* „parto“ de tiu realo, – estas *mem* unu de la kaŝaj spiritaj praesto-elementoj, – sed ĝi estas en la „tiuĉiflanka mondo“ kiel en la „transa mondo“: *kreanto de la fenomenaj formoj*, kiu tie kaj tie ĉi baziĝas sur la efikado de la samaj fortoj.

Al la „*tiuĉiflanka*“ perceptomaniero apartenas efikada rezulto de tiuj fortoj, kiun vi tre bone konas kiel la funkcion de *vijaj fizikaj sensoj*.

Tiuj ĉi sensoj al vi donitaj precize *difinas* vian tutan perceptadon kaj akceptadon de la surtera rea-

lo, kaj rezulte vi perceptas *nur tion*, kion ili *lasas* vin percepti.

Sed ĉar vi *mem* estas „parto“ de la eterna *realo*, same kiel akvoguto en la maro estas parto de la *maro*, vi potencie havas ankaŭ en vi ĉiujn eblojn, kiuj estas entenataj en la eterna *realo*, same kiel la guto en la maro havas ĉiujn ecojn de la mara akvo.

Tial vi estas kapabla percepti ne nur per la sensorganoj de via *fizika* organismo, ĉar vi *mem* estas de *spirita* naturo kaj la eterna proprietulo de via *spirita* organismo.

En via *spirita* organismo vi posedas *aliajn* sensorganojn, kiujn vi ankoraŭ ne konas, kaj sur la *spirita* flanko ili tute respondas al la *fizikaj* sensorganoj en via *tera* korpo.

Per viaj *spiritaj* sensoj vi fariĝas en la „*trans-ejo*“ kreanto de via *spirita* fenomenaj mondo, same kiel vi surtere estas, ne sciante pri tio, kreanto de la *fizika* fenomenaj mondo fariĝanta perceptebla al vi...

Por helpi al via kompreno, mi petas vin rigardi ekzemple homon *hipnotigitan*.

Li vidas, aŭdas kaj sentas ĉion, kion vi per via sugestio volas igi lin vidi, aŭdi aŭ senti, kaj por li tio sugestiita estas vere ekzistanta.

Vi kredas kun plena certeco, ke li subfalis al trompo kaŭzita de vi, – sed estas vi, kiu trompiĝas en tiu supozo.

Vi nur liberigis la hipnotigiton, por mallonga tempo, el la *deviga stato*, en kiu li devas fidi *sole* siajn *fizikajn* sensojn, kaj nun li vidas, aŭdas kaj sentas – portempe kaj tie, kie vi ordonas al li – ankaŭ per siaj *spiritaj* sensoj, kaj per ili fariĝas kreado de tio, kion vi ordonis al li percepti.

Ne vi montras al li tion, kion li vidas, kaj li certe vidas ankoraŭ nenion el tio, kio en *spiritaj* fenomenaj mondoj estas *komune* videbla al *ĉiuj* tie perceptantaj.

Vi gvidas nur lian plastikan fantazion, kaj ĉar – ĉe restriktita funkciado de liaj *fizikaj* sensoj – li samtempe povas percepti ankaŭ per siaj *spiritaj* sensoj, *lia volo* formas portempe el spirita substanco la egalformaĵojn de la imagobildoj, kiujn vi igis lin produkti.

Ne la ligna bastono, per kiu vi tuŝas lian manon, – sugestante ke temas pri *ardanta fero*, – estigas la brulvezikon, kiu tuj videbliĝas sur la mano, sed *la spiritsensa fenomeno* formo de *ardanta fera stango* ĝin estigis, kaj *povis* estigi ion tian nur pro tio, ke ĝi baziĝis sur la efikado de la kaŝaj fortoj, kiuj en *ĉiu* fenomeno estas *tio sola reala*. –

Eĉ ne unu momenton la hipnotigito dubas pri la *objektiveco* de sia propra kreitaĵo, kaj se vi ordonis al li *memori* sian travivaĵon post sia vekigo, li vekiginte apenaŭ povos kompreni, ke lia perceptado *ne* okazis en la *fiziksensa* mondo.

Tiom intensa lia travivado povis esti nur tial, ĉar ĝi baziĝis sur la efikado de la sama *realo*, kiel la *fizika* fenomenaj mondo bone konata al li. – –

Kvankam la hipnoto estis menciata tie ĉi nur *por faciligi la komprenon*, kaj kvankam la rigardoj, kiujn ĝi permesas en *spiritsensajn* regionojn, restas tre malvastaj kaj supraĵaj, tamen tiu ĉi ekzemplo povas montri al vi, ke la *fiziksensa* perceptomaniero, nuntempe je via dispono, *ne* estas la *sola ekzistanta*.

Ni homoj tie ĉi sur la tero estas ĉiuj kvazaŭ en *kolektiva hipnoto*, tiel ke ni tie ĉi ne povas percepti en alia maniero, ol kiel nia „hipnotiganto“, kiu estas nia propra „enkarniginta“ *vol*o, lasas nin percepti, kaj tiu volo ne *estus* en la tera sfero, se ĝi ne strebus al memspertado en *fiziksensa* fenomeno.

Tuj kiam ni sukcesas *returni* nian volon nuntempe direktitan al la fizika mondo, ni konatiĝos kun *aliaj* perceptomanieroj kaj *ties* leĝoj. –

Dum la surtera vivo, tiu voloreturno estas ebla nur al *tre malmultaj* homoj, – sed ĝi okazas *necese*,

tuj kiam la morto de la tera korpo senigas la volokonscion je la ĝisnunaj sensorganoj.

Ĉiu „timo de la morto“ estiĝas el tio, ke la *volo* direktita al la *fizika* mondo rezistas al *inversigo* de la direkto, kiun ĝi elektis en la momento de sia „falo“ el la pralumo. – –

Vi nun certe povas kompreni, ke ĉiu, kiu tie ĉi surtere ankoraŭ *ne* atingis la spiritan „*vekiĝon*“, en la „*transejo*“ unue palpas nur „liman mondon“, kiu konformas al la imagoj de *li mem* kaj de *sami-maganoj*, – sed ke li unue devas esti fariĝinta plena *mastro* de si mem en la propra volo, antaŭ ol li povas esti gvidata supren en la *eternan spiritan lumomondon* de absoluta *plenumiĝo*. –

Krome, ni ne povas akcepti iun, kiu ne forlasis ĉiujn *egoismajn* dezirojn, ĉar lia nura ekzisto en la spirita regiono ĉirkaŭanta nin signifus ties mergiĝon en malordon kaj kaoson, – supoze, ke estus *eble*, ke tia homo *povus* supreniri al la plej alta lumomondo en la spirito.

Eble vi nun komprenas, kial mi emfazis, ke ĉi tie ni ĉiuj estas de *unu* volo, kies celdirekto ne povas ŝanĝiĝi ...

En la spirita regno ni estas fariĝintaj suverenaj regantoj de tio sola reala, – per la kun ĝi kunfandiĝinta *unueco* de nia volo, en kiu ĉiu individua volo retrovas sin nur kiel *komunan volon* ...

Tiel ni fariĝis sciantaj formantoj de la plej alta kaj pura fenomenaj mondo en la spirita regno.

Kiom en stato, kiu konas nek komencon nek finon, ĉar ĝi mem eterne *estas samtempe* ambaŭ, oni tamen povas paroli pri „perfektiĝo“, ni scias, ke nia perfektiĝo estas kondiĉata de konstanta konscia formado kaj konservado de la plej alta kaj plej lumklara spirita fenomenaj mondo, kiu fariĝis al ni sfero de agado kaj templo de adorado ...

Ni „estas“ nenio alia ol nur tio, kion nia unuigita eterna volo *volas*.

Tio, kion oni surtere en la ĉiutaga lingvo nomas „*volo*“, estas nur *dezirado* aŭ la esprimado de iu *inklino*, kondiĉata de cerba funkcio.

Se la *reala eterna volo* de l' homo sur la tero sekvus la *dezirojn*, ĉiu deziro devus plenumiĝi.

Sed, kiel ĉiu scias, la afero tute ne estas tia, kaj ni vere povas danki al la ĉielo, ke surtere *ne* malantaŭ ĉiu deziro staras *volo* ...

Sur la tero nia eterna *volo* „*volas*“ nur en la restrikto, kiun surmetas al ĝi *la volita fizika percep-*

tomaniero, eĉ se la *deziroj* tre ofte kaj tre volonte amus *flugi super* tiun baron.

Nur en la *spirita* regno, – en la sfero de la *alia* perceptomaniero, – nia volo povas *voli* ankaŭ *alie*.

Tie la katenigo fare de la „tiuĉiflanka“ hipnoto finiĝis, kaj la aliaj ebloj de perceptado ekzistantaj en ni povas riveliĝi.

El tio vi refoje vidas, kial estas tiom sence, kredi ke mortintoj povus „materiigi“ sin por komunikiĝi kun surteruloj.

Tio signifus, ke homoj finfine *liberigitaj* el la hipnoto de la fizika perceptomaniero povus denove *subfali* al ĝi. –

Eĉ se tio estus *ebla* „laŭ natura leĝo“, ili ne plu povus *voli* tiun reiron, ĉar la volo jam liberigis sin mem el sia hipnota kateniteco, tute aparte de tio, ke la fiziksensa perceptomaniero estas kondiĉata de la funkcio de la fizikaj sensorganoj.

Kiel mi diris antaŭe, ĉio, kio iam en spiritismaj seancoj estis rigardata kiel „materiigo“ de *mortinto*, kaj ankaŭ ĉiu tie perceptita *fizika* manifestiĝo, estas nur la faritaĵo de estaĵoj, kiuj normale estas *nepercepteblaj* al *homaj* fizikaj sensoj, tamen apartenas al la *fizika* naturo.

Ilia nevidebla organismo tute ne estas de „spirita“ naturo, kaj ili *ne* povas percepti ion spiritan.

Sed ili disponas alte disvolviĝintajn sensorganojn en siaj fizikaj korpoj normale nevideblaj al la tera homo, – sensorganojn, kiuj estas de *fizika* speco kaj funkcias nur laŭ „tiuĉiflanka“ perceptomaniero, sed eksterordinare superas ĉiun fizikan sensfunkcion de la tera homo.

Tiuj estaĵoj havas pliajn sensojn, kiujn la homo de la tero *ne* posedas kaj – tiom bone kiom eble – provas *anstataŭigi* per la funkcioj de aparatoj. –

Tiuj estaĵoj, kiuj estas nevideblaj al homaj okuloj, – sed kiuj estas *tre* klare perceptataj de kelkaj *animaloj* de la tero, – kapablas, por mallonga tempo kaj uzante homajn fortojn, preni sur sin formojn, kiuj fariĝas percepteblaj ankaŭ al la *homaj* fizikaj sensoj.

La portempaj estigo kaj uzo de tiaj formoj estas kaŭzataj per speco de kunfandado kun la *volo* de certaj homoj (la tiel nomataj „mediumoj“) ĉe samtempa uzado de ilia „animala psiko“.

La loĝantoj de tiu parto de la fizika fenomenamondo, kiu *ne* estas konscie perceptebla al la homaj sensoj, estas certasence *tre* „similaj“ al la homo, sed nek temas pri *estintaj* homoj, nek povas iam *fariĝi* homoj el tiuj estaĵoj.

Temas pri estaĵoj, kiuj estas same proksimaj al la homa *nevidebla* fizika organismo, kiel la teraj *animaloj* al la *ekstera* fizika korpo de la homo.

La natura agosfero de tiuj estaĵoj estas la *internaj* regionoj de la organikstruktura parto de la fizika mondo.

La “gnomoj“, „koboldoj“, tero-, aero- kaj akvoferoj de malnovaj fabeloj kaj legendoj – aparte de aferoj evidente aldonitaj de la popola fantazio – estas plejofte prezentitaj tiel, ke oni povas prave supozi, ke temas tie ĉi ne pri fikciaĵoj, sed pri atestoj de reala homa sperto.

Kvankam oni nomis ilin „*naturspiritoj*“, oni ne forgesu, ke temas pri *fiziksensaj* estaĵoj, por kiuj la *spirita* flanko de la kaŭza mondo estas ne nur *nealirebla*, sed, por ilia konscio, eĉ ne *ekzistanta* ...

Nur se homoj *ne konas* tiujn naturdonitajn interligitecojn, aperas pardonebla ilia supozo aŭ eĉ kredo, ke en spiritismaj seancoj ili komunikiĝas kun estaĵoj el la *spirita* mondo.

Certe, estas *eble*, ke pure *spiritaj* estaĵoj, do ankaŭ *mortintoj*, povas en certaj cirkonstancoj fari sin *videblaj* kaj *aŭdeblaj*, – sed vi tiam vidas kaj aŭdas ilin per viaj *spiritaj* sensoj, eĉ se vi havas la impreson vidi ilin per fizikaj okuloj, aŭdi ilin per la fizika orelo.

Sed veraj spiritaj estaĵoj *neniam* faros ian *eksterigon de fizika forto*.

Por ke vi povu percepti veran *spiritan* estaĵon per viaj spiritaj sensoj, estas necese, ke oni portempe *liberigu* vin, deflanke de la spirita regiono, el la „hipnoto“ de la *fiziksensa* perceptomaniero.

La neinfluitaj homoj ĉirkaŭantaj vin nek vidos la figuron vidatan de vi, nek aŭdos iun el la vortoj de vi aŭdataj, kaj tamen via spertado ne necese estas „halucino“, kiu ja estus nur produkto de via propra plastika fantazio ...

Se vi ricevas aŭtentikan spiritan travivaĵon, sen esti serĉinta ĝin, tiam akceptu ĝin respektplene, kaj konservu en via koro tion, kio doniĝis al via sentado.

Sed estus malsaĝe, se vi *dezirus* al vi tiajn travivaĵojn, ĉar *tre alte* disvolviĝinta kritikkapablo estas necesa por sekure distingi *aŭtentikajn* perceptojn de la spiritaj sensoj disde vivaj *halucinoj*, kaj vi certe ne volos vidi „spiriton“, pri kiu vi ne povas scii, ĉu ĝi eble estas via propra projekcia bildo aganta sub masko.

La okazoj de *aŭtentika* spiritsensa perceptado estas *tiom ege maloftaj*, ke la plej prudenta afero estas kredi *nur tiam* je fakta influo el la spirita regiono, se la *plej akra* kritiko *absolute ekskludas* la eblecon de halucino.

Nur ampleksa *sperto* instruas juĝi tion, kaj *seku-
ra* juĝado estas ebla nur al homoj, kies spiritaj sen-
soj jam estas daŭre *malfermitaj*.

Sed tio nomata „*klarvidado*“ *ne* estas la kapablo percepti *spiritajn* formojn.

„Klarvidanto“ kapablas percepti nur loke aŭ tempe malproksimajn aferojn de la *fizika* mondo, – kelkfoje ankaŭ ilian *nevideblan* regionon kaj la lemurajn estaĵojn, kiuj vivas en ĝi kaj kiujn li tiam rigardas kiel „spiritojn“.

Eĉ se „klarvidanto“ donas la plej frapantajn pruvojn de sia kapablo vidi *forajn*, *estintajn* aŭ *estontajn* aferojn, tamen temas nur pri vidado ene de la *fiziksense* perceptebla fenomena mondo.

Tie, kie li kredas vidi aferojn *spiritajn*, li raportas aŭ pri la nevidebla parto de la *fizika* mondo aŭ pri aferoj ŝajnitaj al li de *lia propra plastika fantazio*, kaj li bonafide rigardas ĉion viditan kiel objektivan ateston de la spirita mondo.

Tiuokaze liaj vizioj ĉiam montros la koloron de la *antaŭjuĝoj* kaj *opinioj*, kiuj mastras lin en lia ĉiutaga vivo surtera.

Se li estas *kristano*, li povas raporti pri la sanktaj figuroj de la *evangelioj* aŭ pri kanonizitaj „*sanktuloj*“; se li elkreskis en la idearo de *hindaj* religi-

sistemoj, li kredas vidi la diojn de la *bramanismo*, sed kiel tibetano la diojn de la *mahajana skolo*.

Sennombraj eraraj imagoj pri la „transejo“ estis kaj ankoraŭ estas disvastigataj de „klarvidantoj“ inter akceptemaj kredantoj, ĉar oni naive konkludas el la konfirmo de iu *klarvidita afero fora aŭ estonta*, ke ankaŭ *spiritaj* sferoj estas malfermitaj al la „klarvidanto“.

Sed la organo de „klarvidado“ estas nenio alia ol rudimenta *fizika* sensororgano el la pratempo de la homaro sur tiu ĉi tero.

Kiel ekzemplo de „atavismo“ tiu sensororgano kelkfoje troviĝas ankaŭ en homoj de la nuna tempo en formo sufiĉe funkcia.

La kapabloj de „klarvidado“, „klarsentado“, „klaraŭdado“ baziĝas sur la povo uzi tiun sensororganon.

Al tiu kapablaro apartenas ankaŭ tio nomata „psikometrio“, t.e. la vidado de pli fruaj sortoj de objekto je nura tuŝado, kaj kelkaj variaĵoj de la kapablo „aŭguri“, eĉ se oni faras ilin en maniero, en kiu, intence aŭ nekonscie, oni vualigas la realan proceson.

Por ke vi lernu *kompreni*, kio la „transa mondo“ estas, vi devos lerni distingi tri regnojn en la kosmo.

Unue, la regnon de la *fiziksensa* perceptomaniero, aŭ la *fizikan* mondon.

Due, la regnon de *spiritsensa* perceptomaniero, aŭ la mondon de la *spirito*.

Kaj trie, la regnon de la *kaŝaj*, kaŭzantaj fortoj de la *praesto*: – tion *solan realan*, sur kies efikado baziĝas *ĉiuj* perceptomanieroj kaj iliaj fenomenaj mondoj, kaj sur la spirita kaj sur la fizika flankoj de la kosmo.

Tiuj kaŝaj, kaŭzantaj fortoj de la esto efikas en la tera homo kiel liaj „*animoelementoj*“.

Tuj kiam ili kristaliĝis al portempa akumuligita formo en la vivo de unuopa homo, ili akceptas kva-zaŭ la individuan „koloron“ de tiu homo, kaj ili estas, por ĉiuj estontaj tempoj, *destinataj* de la eterna *volo* manifestiĝanta en li, tiel ke ili devas estontece sekvi la ricevitan impulson, ĝis tiu ĉi trovis sian *plenumiĝon*.

Se tiu plenumiĝo ne povas esti trovata dum la surtera vivo de la homo doninta la impulson, tiam la „animoelementoj“ strebantaj en la destinitan direkton agadas *ree kaj ree en la vivoj de novaj homoj*, ĝis ili fine atingas *plenumiĝon*, *kunfandante* sin kun la *volo* manifestiĝanta en homo kaj fariĝante *unuiĝo* kun ĝi.

Erara interpreto de tio, kion de tiu okazado ili povis percepti, forkondukis la popolojn de la orien-

to al la kredo je multfoja „reenkorpiĝo“ de la homo per naskiĝo sur la tero.

Sed laŭvere, tia „reenkorpiĝo“ – do refalo en la memhipnoton de la *fiziksensa* perceptomaniero, – estas ebla nur ĉe homoj, kiuj konscie kaj intence mem detruis sian korpon (kio estas *neniuokaze* la faro de la eterna *volo*, sed *ĉiam* nur eskapoprovo de la *deziro*); plie, ĉe infanoj mortintaj antaŭ ol ilia eterna volo trovis plenumiĝon de sia strebo al fiziksensa spertado, kaj trie, ĉe homoj, en kiuj la strebo al tia spertado kvazaŭ hipertrofiigis, tiel ke eĉ la morto de la tera korpo povis interrompi la memhipnoton nur por mallonga tempo.

La instruo pri reenkarpiĝo do respondas tiom malmulte al la *normala* okazado, kiom la memmortigo aŭ la morto en frua infanaĝo povas esti rigardata kiel *tiu* formo de finiĝo de la surtera vivo, kiu estas destinita al *ĉiuj* homoj ...

Se leviĝas en vi „rememoroj“ aŭ nur mildaj sentetoj, kiuj sugestas al vi la kredon, ke vi povus esti travivinta pli fruan surteran vivon, tiam certe estas *eble*, ke tiu kredo ne trompas vin kaj ke vi mem estas ekzemplo de unu el la tri *apartaj okazoj*, kiuj solaj permesas reenkorpiĝon, – sed vi agos pli prudente, se vi ne provas trovi respondon al la demando, ĝis post via surtera vivo iam doniĝos al vi la sola *certa* respondo en la spirita regno.

La sento, ke vi iam vivis sur la tero kiel *individuo alia ol vi*, *ĉiam kaj kun plena certeco* estas *trompiĝo*, ĉar en la indikitaj tri apartaj okazoj, kiuj solaj permesas plurfojan reenkorpiĝon sur la tero, ĉiam la *sama* individuo restas en preteco sperti sin mem surtere ankaŭ en la nova enkorpiĝo.

Sed oni povas supozi kun certeco, ke preskaŭ ĉiu ne tute malsentema homo kelkfoje rimarkas en si la agadon de „animoelementoj“, kiuj ricevis sian impulson de homoj de pli fruaj tempoj kaj nun provas atingi plenumiĝon de tiu impulso.

Tiam povas okazi, ke al la homo spertanta tion en si montriĝas tre vivaj *bildoj de rememoro* originantaj el la vivo de tiuj homoj, kiuj, antaŭ longa tempo, donis la impulson al la „animoelementoj“ nun agantaj en la vivo de nova homo.

La eraro, kion oni tiam faras kredante, ke oni *mem* estis *tiu*, el kiu originas tiuj bildoj de rememoro pri memtravivitaĵo, estas tre facile *komprenbla*, sed estas subtenebla nur per tro supraĵa sperto.

Ĉiu unuopa homo estas *unufoja kaj unika* emanaĵo de la *pravolo*, – estas elirinta el la eterna „neformita maro de la Dieco“ por atingi *sian*, de *ĉiuj* aliaj kunemanaĵoj diferenca, individuan *formperfektiĝon*.

Kiu naskiĝis sur tiu ĉi tero kaj nun devas suferi la penojn, premojn kaj dolorojn, kiuj estas nedisigeble ligitaj al la ekzistado en la animaleca korpo, tiu *mem* kreis al si tiun sorton, ĉar, pro la ekzistado en tiu ĉi fiziksensa fenomeno, li mem *interrompis* la vojiradon al sia formperfektiĝo en la spirito.

Neeviteble li devas, pli aŭ malpli frue, veni al sia returniĝo, por tiam denove strebi al sia spirita formperfektiĝo.

Ju pli frue en sia surtera vivo li *ekkonas* tiun ĉi solan manieron turni sin el sia mizero, des pli da progresigo li povas tiri el sia surtera vivo por la plua irado sur la vojo de perfektiĝo, – des pli facile estos forigi, jam surtere, la obstaklojn, kiuj alie povas fariĝi grandaj malhelpoj sur tiu ĉi spirita vojo. –

Eĉ se homo en sia surtera vivo *ankoraŭ ne* atingas *propran* konscian spertadon per siaj *spiritaj* sensoj, tamen io tre grava estas atingita, tuj kiam li estas sciigita per *komunikoj* de kunhomoj, al kiuj jam malfermiĝis tia spertado, pri la vera strukturo de la „*transa mondo*“, kiu atendas lin post lia tera morto.

Kvankam en la *fiziksense* perceptebla mondo ekzistas nur *unu speco de perceptomaniero*, kreante fenomenojn, tamen la mondo de formiko aŭ tiu de birdo diferencas tre multe de via mondo; tiel same

ekzistas tre multaj diferencoj inter la diversaj mondoj de la spiritsense perceptantaj estaĵoj.

Ekzistas sennombraj *spiritaj* mondoj, same kiel ekzistas sennombraj mondoj de *fiziksensa* fenomenforma.

Sed sian plej altan formperfektiĝon trovas la individuigita eterna *volo* nur tiam, kiam li sukcesas unuigi sian individuan voladon kun la *volo malantaŭ ĉio*, en la plej interna regno de la spirito: – la regno de la kaŭzokreantaj eternaj agadaj fortoj de la esto: – en la lumomondo de *tio sola reala* ...

Transe de tio ekzistas por la homa spirito *nenio*, ĉar tempe, space kaj laŭ siaj eblecoj de plenumiĝo tiu plej sublima el ĉiuj mondoj estas *senfina*.

Kiom la „*nelimigita*“ esto, la „senborda, senfunda maro de la Dieco“, estas *alirebla* por la konscio difinita per la *formado* de la *volo* kaj tial *limigita*, kvankam „senfina“, tiom ĝi *sole en tiu ĉi plej alta lumomondo*, en ĉiu el la voloj tie unuigitaj, fariĝas *konscia pri si mem*. – –

Tio, kion mi provis klarigi al vi en tiuj tri traktadoj, ampleksas ĉion, kion la homo povas ekkapti sur la tero kaj dum tiu ĉi surtera vivo pri la plej interna mistero de sia ekzistado *tie ĉi* kaj en la *alia* mondo, kiu *post* lia tera morto atendas lin.

Ĉio cetera, kion oni rakontas al vi pri la „*trans-ejo*“, – ĉu fantasta fikcio de tro fervora kredo, ĉu la rezulto de spekulativa pensado – estas: *griza teorio kaj nesubstanca ĥimero*.

Sed vi ne kredu je iu ajn „mondobildo“ nur tial, ke ĝi trovis ankaŭ aliajn kredantojn, ĉar via animo ne trovos pacon, antaŭ ol ĝi rekonis sin mem: – kiel *mematestaĵon de tio sola reala*.

Kion oni faru?

En la libroj „*pri la vivanta Dio*“, „*pri la transa mondo*“ kaj „*pri la homo*“ mi donis la unuan detalan priskribon de la interna vojo, kiun devas elekti ĉiu, kiu en sia koro serioze volas trovi en si mem sian *spiritan naturon*.

Mi montris, kion homo ekiranta tiun vojon devas *fari*, kaj kion li devas *ne fari*.

Tamen oni ĉiam denove demandis min: „Kion ni nun *faru*? – Kiel ni *komencu*?“

El la formoj kaj motivoj de *ĉiuj* ĉi demandoj estas klare ekkoneble, ke oni atendas precizan instrukcion, por poste fari ĉiutage ripetendan, laŭeble plej misteran „*ekzercon*“, kiu sukcesu, se oni sekvas la instrukcion pli aŭ malpli „*mekanike*“.

Mia situacio vidalvide al la demandantoj estas simila al tiu de kuracisto, kiu preskribas nur la plej simplajn naturajn kuracilojn, dum liaj pacientoj restas nekontentaj pro tio, ke li ne donas al ili „recepton“ ...

La plej multaj el tiuj demandantoj kaj demandemuloj antaŭe estis, sur la vojoj elektitaj de ili, eniĝintaj en la labirinton de moderna „teozofia“ aŭ „okultisma“ literaturo, kaj nur danke al siaj sanaj instinktoj, kvankam kun sufiĉe da peno, ili trovis elirejon.

Tamen tiu erarado certamaniere *progresigis* la serĉantojn, ĉar ne ekzistas eraro, kiu ne povus konduki sur ĉirkaŭvojoj fine al la vero.

Tial neniu „*malbenu*“ la tempon de sia erarado, ĉar li ne scias, kion li eble ŝuldas al ĝi.

Do, al neniu el la fine liberiĝintoj la palpa esplorado de la labirinto de „teozofia“, „antropozofia“ aŭ „okultisma“ kredinstruaro estis tute senutila.

Per ilia palpa serĉado, en multaj el ili estiĝis la konvinko, ke *malantaŭ* ĉio erara en la instruoj aŭditaj *ja* devas esti kaŝita iu *vero*.

En aliaj vekiĝis la sento, ke la legendo pri la tiel nomataj „mahatmoj“ – la misteraj, laŭdiraj fondintoj de la nova „teozofio“ – povis estiĝi nur tial, ĉar la oriento scias pri la ekzisto de viroj unuigitaj kun

la spirito, kiuj – kvankam ili ne praktikas ĉiuspecan sorĉadon, kiun oni atribuis al la menciitaj fakiroj naskiĝintaj el la fantazio – estas *vere* konsciaj en la *spirito* jam dum sia surtera vivo.

Sed la plej multaj serĉantoj kunprenis kun si el la labirintaj ĝardenoj la malsaĝan kredon, ke estas bezonata nur la kono de sekreta, certe tre mistera „tekniko“ por fariĝi, per ties praktikado, el ĉiutaga homo tuj kaj senprokraste „viziulo de pli alta ordo“, „inicito“, kaj eĉ „majstro“ de spirita agado.

Kiom *ĝustaj* la *unuaj* du supozoj estas, tiom *malĝusta* kompreneble estas la *laste* menciita kredo.

Sed senkonsciencaj ĉarlatanoj kaj lertaj animkaptistoj *uzas* ĝin, kaj ili donis al siaj disĉiploj pli aŭ malpli dubindajn instrukciojn el malnovaj mistikaj skriboj, dum ili mem, la „sekretaj instruantoj“, pleje ne sciis, kiuj *efikoj* povas rezulti el la fidela sekvado de tiuj instrukcioj.

Sed la disĉiplo kredas esti sur ĝusta vojo, ĉar li vidas, ke, per la sekvado de la instrukcioj donitaj al li, estas fakte atingeblaj certaj rezultoj, pri kiuj la ordinara psikologio scias nenion, *spite* de ĉiu psikologia esplorado kaj ĉiu aŭskultado de la homa „*subkoscio*“ de la homo.

Iu aŭ alia el la „sekretaj instruantoj“ eble estas nur sklavo de sia *vanteco*, kiam li transdonas instrukciaron por laŭsupoza „malfermado de internaj sensoj“, kiun li elfosis el iu malnova pergamena volumo kaj kiu malfermas nenion alian ol la mucidajn kriptojn, kie prosperas *aktiva* formo de *spiritisma mediumeco*, kies kulturadon oni prave lasu al certaj aziaj arlekenoj. —

Ne estas necese, ke sinjoro la „sekreta instruanto“ mem *kredu* je la efikeco de siaj instrukcioj.

Kiel iu „portanto de baciloj“ povas *mem* esti *sana* kaj tamen disvastigas la plej terurajn *patogenajn mikrobojn*, tiel same tute ne estas necese, ke la disvastiganto de metodoj por laŭdira „malfermado de internaj sensoj“ mem sciu, ke li progresigas nur la disvolviĝon de *aktiva spiritisma mediumeco* en siaj kompatindaj viktimoj.

Sed por la disĉiploj de tiaj diversgradaj malutiluloj estas *facile*, kontraŭstari al la moderna scienca kritiko, ĉar ili povas ekkoni el ĉiu vorto de la erudita kritikanto, kiom *senscie* tiuj plej respektindaj esploristoj eksperimentas en regiono, en kiu montriĝas *unu* fatamorgano post *alia*, logante la eksperimentiston tiom certan de si mem des pli profunden en la dezerton, ju pli firma fariĝas lia kredo esti nun „*tute proksima*“ al la definitiva *respondo* al sia demando. — —

Oni povus nur bonvenigi la provon de nova psikologio definitive *senvalorigi* certajn dubindajn, tiel nomatajn „supersensecajn“ fenomenojn, se tiu ĉi provo ne *senvalorigus* sin *mem* per la *malĝustaj konkludoj*, kiuj estas tirataj de la esploristoj el sendube *ĝuste* observitaj procesoj, konkludoj kiuj tuj montriĝas kiel malĝustaj al ĉiu spertulo.

Ankaŭ neatakeble pura strebo al ekkono de la vero finiĝos en *eraro*, se *antaŭjuĝoj* katenas la veroserĉanton.

La sekvo estas, ke la anaro de ruzaj animkaptiloj, kiu estas nekapabla por kritikado kaj palpe eraras en la nebulo de konfuzaj ideoj, jam antaŭ longe mallernis serĉi *veron* en ekkonoj de la *scienco*, – sed anstataŭe volonte lasas sin imponi de ĉiu petola trompisto, se tiu scias lerte surmarketigi sian multkoloran miksaĵon kiel laŭasertan „*sekretan sciencon*“ ...

Se oni krome povas atingi, laŭ lia „metodo“, la supre menciitan *mediumecan disvolviĝon*, tiam li atingis sian celon, kaj oni kredas ĉiun vorton lian, kiam li diskonigas per mistere mallumaj aludoj, ke li estas la reenkarniĝo de iu elstara homa spirito de la pratempo.

Al ĉiu, kiu legas miajn avertojn kun kelka prudento, certe jam antaŭ longe klariĝis, ke mi plej ekzakte konas ĉiujn malnovajn kaj novajn „metodojn“ menciitajn en ili, – sed ke mi facile povus indiki kelkajn aliajn vojojn al tiel nomata „supersenseca disvolviĝo“, kiujn konis *neniu* el la strangaj sanktuloj, kiuj en la proksima pasinteco estis rigardataj de iliaj anoj kiel „*inicitoj*“ kaj „*sekretscienculoj*“.

Ekzistas ebloj atingi rezultojn, kiuj ne nur al la plej bonaj disĉiploj de tiaj „sekretaj instruantoj“ devus aperi neatingeblaj, sed ankaŭ prezentus kelkajn enigmojn eĉ al la plej sagaca psikologia kritiko.

Se ne estus nepardonebla *krimo* montri eĉ *nur alude* la danĝerajn vojojn tie ĉi celitajn, tiam indiko eble povus klarigi iun aŭ alian aferon, kiu povas esti senvualigata nek per psikologia eksperimento nek per metapsikia esplorado.

Kiom ajn volonte mi farus tiun servon al la scienco, mi tamen ne povas fari ĝin, ne nur pro la kaŭzo *jam menciita*, kaj pro la *devo* liganta min, same kiel ĉiujn miajn spiritajn „fratojn“, por ĉiam kaj eterne, sed ankaŭ tial, ĉar temas pri sfero, en kiun oni povas *legitime* eniri nur tiam, se oni estas preta dediĉi al ĝi *pli* ol nur „fervoro por scienca esplorado“...

Estas apenaŭ necese emfazi, ke tie ĉi temas pri *alio* ol la jam sufiĉe konataj „ekzercoj de *hatajogo*“ kaj la metodoj, devenigitaj el ili, por fari certajn *fakirmiraklojn*.

Sed eĉ se mi estus neniel devoligita, mi tamen neniam estus preta senvualigi tion, kion oni tenas kaŝita pro tiom gravaj motivoj, ĉar mi scias tro bone, kia *malfeliĉego* tiam estus kaŭzata per la manoj de potencaviduloj.

Sed mi tute ne soifas „Prometean sorton“, al kiu mi neeviteble devus subfali, se mi volus fariĝi la senrespondeca kaŭzanto de tia malfeliĉego.

Por atingi la *spiritan unuiĝon kun la pralumo*, – por la *vekiĝo* de la *spirita* naturo de la homo el ĝia dormo, – por tio, kion sublimes ekkono nomis „*renaskiĝo*“, – la konoj tie ĉi aluditaj estas *nek necesaj nek utilaj*.

Kiel *ĉiuj* artoj baziĝantaj sur la eblo uzi alttensiajn, normale nekonatajn psikofizikajn fortojn, tiel ankaŭ tiuj preparolitaj ĉi tie havas *absolute nenion* komunan kun la veko kaj disvolvado de la eterna *spirita homo*.

Kio estas postulata por *tiu ĉi* veko kaj disvolvado, estas antaŭ ĉio la konstanta direktiĝo de la tuta pensado, sentado kaj surtera volado al la alstrebata celo.

La tuta tera homo unue devas iom post iom transformi sin *mem per sia propria* forto, antaŭ ol *spirita helpo* povas doniĝi al li.

Utilas *malmulte* aŭ *neniom*, se oni sin dediĉas al tiu memdirektiĝo *nur de tempo al tempo*, kiel la pilo en komunumo kutimas konsekri ĉiusemajne *unu* tagon al *sia Dio* ...

Ĉiu minuto de la plua vivo, ĉiu ago ĉiutageca, ĉiu leviĝanta penso, ĉiu deziro kaj ĉiu impulso de la tera, cerbokondiĉita volo devas stari sub la formanta influo de la postulita memdirektiĝo, se la homo ekpaŝinta sur tiu ĉi vojo atingu sukcesojn *realajn* kaj ne *sole imagitajn*.

Periode farendaj „ekzercoj“ povus plejfavoroakaze konsisti en ripetita koncentriĝo al *pli profunda sentado* de tiu memdirektiĝo.

Ĉio, kio eble estas rekomendata en tiu rilato, havas nur *unu* celon: teni maldorma en la konscio la novan direktiĝon de ĉiu pensado, sentado kaj aspirado, tiel ke ĝi eĉ dum momento ne plu povas esti forgesata.

Se tiu interna memdirektiĝo estas firme tenata vere *daŭre*, tiel ke ĝi efike formas *la tutan vivon ĉiutagan*, – indifere, per kiuj rimedoj, adaptitaj al la *propra* individua naturo, oni tion atingas, – ti-

am ĉio plua baldaŭ okazos „per si mem“, t.e. sen propra konscia kunagado.

En homo tiumaniere firmigita tiam formiĝas *centro de fortoj*, kies efikado pli kaj pli grandiĝas kaj kiu fine estigas la spiritan interligon kun similaj, jam *perfektiĝintaj* fortocentroj tie ĉi surtere, kaj tio eĉ ne necesigas apartan voloagon.

Tuj kiam tiu interligo estas *ebla*, la serĉanto ricevas la spiritan helpon de tiuj jam *trovintaj*, kiuj ne konas pli altan devon ol helpi ĉie, kie oni kapblas *enpreni* ilian spiritan helpon, indifere, ĉu oni jam povas senti ĝin en sia konscio, aŭ ne.

Tiam la serĉanto estas fariĝinta kvazaŭ „ricevilo“ por certa speco de spirita enradiado, kiu estas *interne* perceptebla, sed *ne* detektebla per *sciencia eksperimento*.

Influoj el la regno de la substanca spirito povas esti spertataj nur per *interna ekkonado*, kaj neniam povas prezenti al sciencia ekzamenado fare de aliulo materialon por pensa difinado, ĉar temas tie ĉi pri *io viva*, kiu tuj retiriĝas, kiam oni faras eĉ la plej mildan provon pripalpi ĝin. –

Sed oni ne pensu, ke oni povas fariĝi tia „ricevilo“ kiel per turno de la mano.

Kiu volas esti akceptata de tiuj eternaj kiel metilernanto, tiu devas surmeti la laborveston de pacienco ...

Eĉ la plej intensa, *surtere estigita volo* – kiu estas nura eksterigo de *cerbofunkcioj* kaj devas esti tre precize distingata disde la *substancia eterna volo* manifestiĝanta en la homa spirito – ne kapablas akceli la disvolviĝon de la spiritaj ricevoorganoj.

Cerboestigita „volado“ *tro obstina* nur ĝenas la kristaliĝadon de la koncernaj fortoj, kiuj estu kunigontaj formante novan fortocentron, kiu tiam *ne* estas submetita al la cerbofunkcioj.

Ju pli persiste la jam menciita interna „*memdirektiĝo*“ de la tuta homo restas fiksita, – kiel teleskopo devas resti direktita kaj enfokusigita al la observata objekto –, des pli baldaŭ povas esti atingata la momento, kiu venigas la serĉanton ankaŭ en *senteblan* kontakton kun liaj spiritaj helpantoj.

Sole la *praktika kondutado* de la serĉanto *en lia ĉiutaga vivo* estas decida, – ne la sekvado aŭ nesekvado de „ekzercoj“ de iu ajn speco.

Sed tio ne signifas, ke ne estas permesate doni sin regulperiode al *aparta formo de spirita enprofundiĝo*, se oni rimarkis, ke tio firmigas la internan memdirektiĝon al la spirito ankaŭ en la praktika konduto ĉiutaga.

Kiam la serĉanto venis en sufiĉan kontakton kun siaj spiritaj helpantoj, tiam unue okazas speco de provo de liaj fortoj, kaj depende de ties rezulto la plua spirita influado estas „adaptata“ al li.

La gamo de eblaj formoj de spirita enradiado komenciĝas je nura *pliintensigo* de la *propraj fortoj* de la serĉanto kaj etendiĝas supren ĝis *persona spirita gvidado*.

La malmultaj, kiuj jam *antaŭ* sia surtera naskiĝo staras sub tia gvidado, por ke ili perfektigu sin al „majstroj“ de spirita agado sur la tero, fine venas al plena *spirita* kunfandiĝo kun la gvidanto, kvankam tiu ĉi eble vivas en fora mondoparto, tiel ke la disĉiplo ne plu ricevas *abstraktan* instruon, sed *kunspertas* ĉion, kio okazas en la spirito (ne en la „cerba konscio“) de lia instruanto.

La intenco de la „majstro“ igi certajn, en li vivajn spiritajn procesojn sentebajn *ankaŭ al sia disĉiplo*, sufiĉas por tio, ke la disĉiplo perceptas tiujn procesojn tiel, kvazaŭ ili okazus en li mem, kvankam li scias sen ia dubo, *kiumaniere* li venas al tiu kunspertado.

Ĉar la „majstro“, por *sia* individueco, jam antaŭ longe *atingis* la unuiĝon kun la „pralumo“, la disĉiplo spertas tiun unuiĝon unue *en la kunfandiĝo kun* la tralumigita animo de *sia* instruanto.

Iom post iom la disĉiplo fariĝas matura por atingi la unuiĝon kun la pralumo *memstare*.

Alveninte al tiu celo, li konscias ne nur sian *propran* spiritan, *eterne nedetruieblan* individuecon, sed samtempe sentas en si la konscion de *ĉiuj* individuoj en la spirito, kiuj iam manifestiĝis en homa konscio ...

La en tiu maniero perfektigiĝinto perceptas sin *kunfandiĝinta* kun ĉiuj samamaniere perfektigiĝintaj en nova *komuna konscio*, kun kiu nenio konata surtere estas komparebla.

Lia propra *individua* konscio kuŝas ene de tiu komuna konscio.

Sed *neniam* la individua konscio de la perfektigiĝinto povas esti „dissolvata“ en la komuna konscio.

La individuo vivas en tiu kunfandiĝo por eterne la vivon de la *tuto*, *penetrante* ĉiujn aliajn individuojn de tiu tuto *kaj mem penetrante de ili*, sen tio, ke iu el tiuj unuigitaj individuoj spiritaj povus iam perdi sian propran ekziston, difinitan de ĝi mem.

Absolutan *certecon* pri la plua ekzistado de la homa konscio, kiu post la terkorpa morto eterne sin spertas laŭ *spirita* perceptomaniero, havas laŭnature nur la malmultaj, kiuj jam *atingis* la tie ĉi montritan celon dum sia surtera vivo.

Ĉiuj *aliaj* homoj povas nur fari *supozojn* aŭ serĉi *trankviligon per iu kredinstruo*, – se ili ne preferas konfidi al la komunikoj de la malmultaj el iliaj kunhomoj, kiuj jam dum sia surtera vivo konas „la vivon post la morto“ *el propria sperto*.

La aŭtentikaj atestoj de tiuj, kiuj atingis la celon *reale*, kaj ne nur en la ebrio de ekstazo, aŭ katenite per iu speco de hipnoto, estas, por kritiko ne ligita de *antaŭjuĝo*, *tre bone distingeblaj* disde la fantasta konstruaĵoj de konfuzitaj troentuziasmoj aŭ de fantaziuloj kun poezia talento.

Oni povas trovi la aŭtentikajn sciigojn de homoj konsciaj pri la transa mondo *en ĉiuj popoloj*, kaj *en ĉiuj tempoj* vivis unuopaj homoj, kiuj donis veran raporton pri la vivo en la spirito.

La *vesto*, en kiu tia raporto sin vualas, eble estas tajlita laŭ la modo de la *tempo* kaj havas la koloron de la *kredo*, kiu sola estis tiam agnoskita, – sed tiu, kiu ne kontentigas sin per la apero, ekkonos en *ĉiu* tia vestaĵo ree kaj ree la *homon* kaj ties plej profundan spertadon: – *la unuiĝon kun la fonta fundo de ĉia esto de la eterneco kaj de ĉia ekzisto en ĉiuj sferoj de spaco kaj tempo*.

Kiu komprenis, *kion* postulas de li la alta vojo, kiun miaj skriboj montras al li, kaj kiun celon ankaŭ *homo malmulte taŭga* povas atingi sur tiu vojo

dum la surtera vivo, tiu *ne plu* metos al mi la demandon, kion li „*faru*“, atendente, kiel respondon, sciigon pri stranga „ekzerco“.

Li certe ekkonis, ke tie ĉi temas pri *io nemezureble pli alta* ol miraklecaj „fakiraj fortoj“, – pri *io nemezureble pli alta* ol la plej mirindaj „mirakloj de la okultismo“, – kaj pri *io nemezureble pli alta* ol la „sekretaj instruoj“, strange ornamitaj per sciencaj ekkoneroj, de cerbokatenitaj konventetoj.

Kvankam mi devas – por esti komprenata almenaŭ de tiuj estantaj plej multe en danĝero – rilatigi miajn komunikojn al aferoj jam konataj, kaj kelkfoje ĉerpi ankaŭ el la terminologio de la oriento, kiu vaste konatiĝis per „teozofiaj“ skriboj, tamen homo kutime serĉanta pli profunde baldaŭ ekkonos, ke mi parolas pri aferoj, kiuj ĝis nun estis prezentataj nur per sufiĉe *distorditaj* bildoj.

Eĉ erudita orientalista, kiu konas ĉiujn tekstojn de la oriento hodiaŭ alireblajn, trovos en ili nur *vualitajn indikojn* pri tiu kaŝa instruo, ĉar la malnovaj sanktaj skriboj estis skribitaj senescepte por homoj, kiuj jam estis ricevintaj *sekretan* instruadon „de buŝo al orelo“.

La homoj formintaj la malnovajn religiajn librojn *intence* almiksis sobrajn raportojn, kronikojn aŭ rakontojn, kiuj entenas *absolute neniom* da kaŝa instruo, al la manuskriptoj, pri kiuj oni volis,

ke ili estu kompreneblaj *nur al iu preparita*, dum la laŭvorta senco ofte diras la malon de tio, kion la sciantoj povis kompreni el la sama parto de la teksto.

La instruoj, al kiuj mi tie ĉi fariĝas parolanto, krome estis, eĉ en formo *vualanta*, konfidataj al la skribo *ekstreme malofte* kaj ĉiam *nur fragmentece*.

Sed la skriboj, en kiuj tiuj fragmentoj troviĝas *kunigitaj*, estos *nek hodiaŭ nek estontece* alireblaj por nevokitoj, kaj „nevokita“ estas ĉiu, kiu ankoraŭ ne *spertis* en si en *spirita* maniero tion, kio estas prezentita en tiuj manuskriptoj, sub la formo de lapidare konciza gvidilo, kiel *spertebla*.

Ĝis antaŭ mallonga tempo, la malmultaj homoj, kiuj *vivas* tiun instruon kaj tial *povas* „instrui“ ĝin, strikte respektis praajn preskribojn, kiuj absolute malpermesis *publikan* disdonon eĉ de tiom malmultaj aludoj, kiujn mi nun havas la *devon* doni.

Mildigo de la rigora interpreto de tiuj preskriboj nun ebligis la publikan prezentadon de tiuj instruoj en la ĉi tie donita kunteksto, post kiam la altaj direktantoj de la spirita hierarkio, kies plej malaltan rangon formas ĝiaj malmultaj membroj sur nia planedo, estis ordonintaj tiun pli mildan interpretadon, kiel konforman al la bono de la tempo.

Kiu volas ekkapti tion, kion mi nun publike instruas, tiu devos demeti la opinion, ke temas pri nova variaĵo de iu kredoinstruo, aŭ eĉ pri reklamo por iu el la sistemoj de orienta filozofio.

Kiu provas trovi spurojn de la ekkonado, al kiu mi servas, en la historio de la homaro, tiu certe povos trovi ilin.

Tiu ekkonado estis *plej pure* viva en homoj *en la frua tempo de antikvaj misterkultoj*.

Sed al spertaj oreloj la voĉoj de *ĉiuj jarcentoj* parolas klaran lingvon, kaj ne tro granda peno estas postulata por ekkoni, ke la *elira loko* de la atesto tie ĉi donita estis, kaj ankoraŭ hodiaŭ estas, vaste efektiva sur la tero, kiel fonto de inspirado por *ĉiu* homa unuiĝo, kies sublima celo estis aŭ ankoraŭ estas la atingo de *plej alta homa digno*.

Multo povus esti dirata tie ĉi, kiu nun ne povas esti preparolata, ĉar ĝi rilatas al aferoj, kiuj devas esti trovataj de tiuj *mem*, kiujn tio prisilentita koncernas.

Sed kiu ajn volas *rikolti* la fruktojn kreskantajn en la ĝardeno de la instruaro tie ĉi prezentita, tiu devas fari *sian tutan vivon* ĉiama „ekzerco“.

La *nova vivo*, kiun li volas trovi, jam estas entenita en lia ĉiutaga vivo, – sed li ankoraŭ ne povas *ekkoni* tion al li novan. –

Li ne bezonas malbone efikantajn „ekzercojn“ de „sekretaj instruantoj“, ĉar lia ĉiutaga vivo *mem* estas la plej efika, *vere spirita* „ekzerco“, kiun *la eterna pralumo* ĉiutage denove donas al li por prilaborado. –

En la ĉiutaga vivo, – en la plej simpla formo kaj sen iu mistera gesto, – li iom post iom trovos la perfektigon al li atingeblan tie ĉi surtere, – sed neniam en „esoteraj skoloj“ kaj orgojlaj rondoj de laŭdiraj inicitoj, kies impertinenteco igas ilin ludi la rolon de spiritaj „instruantoj“, kaj por kiuj oni povas nur peti *pardonon*, ĉar ili *ne scias*, kion ili faras.

La spirita perfektigo postulas la *tutan* homon.

Dum la strebado al tiu perfektigo, „korpo“ kaj „animo“ *neniam* estu sentataj *aparte*.

Ekzistas nenio „korpa“, kio ne *samtempe* estas io „anima“, kaj temas *ne* pri „spiritigo“ de la korpo, sed pri la surtere ebla kaj surtere spertebbla *en-korpigo de la eterna spirito* per la fortoj de la *animo*. – –

Kiu *malestimas* la korpon kaj tamen esperas atingi la regnon de la substanca eterna *spirito*, tiu anstataŭe trovos nur novan *regon de iluzio*.

Sed de la *korpo* estas postulate, ke ĝi lernu *fidi* la eternan, superpersonan „mi“, al kiu ĝi *fariĝu prezentilo*.

La eterna, spiritgenerita „*mi*“ estas la pura *fonto* de la spiritaj fortoj en la homo de la tero, sed la korpo estas la *sitelo por ĉerpi* tiujn fortojn kaj levi ilin en la surteran vivon.

En tiu eterna „*mi*“ ni trovas *nin mem*, tiaj, kiaj ni *eterne* estas en *tio eterna*.

Nur en tiu plej interna „*mi*“ ni trovas la ĉion ampleksantan, *eternan, substancan spiriton*.

Sole en via, vin mem estiganta „*mi*“ vi trovas *vian „vivantan“ Dion*. –

Ne per intelekto kaj vasta erudicio oni atingas tion *plej altan*, kion homoj povas atingi.

La spirita *perfektiĝo* estas rezulto de la vivo, – ne la laborrezulto de tranĉile akra *pensado*.

Vere ekzistas io, kio povas esti akirata *nur* per la *intelekto*.

Tion oni *pense* akiru por „*scii*“ ĝin.

Sed poste la saĝulo sin levas *super* la scion, ĝis li lernas pensi tiel, kiel pensas *infanoj*. –

Ne pensi „*infanaĝe*“ vi lernu, sed vi denove venu al la *unueco de pensanto kaj tio pensata*.

Kiam vi estis infano, vi en tia unueco pensis *viajn unuajn* pensojn, kaj nur en la sama unueco la *finaj kaj plej altaj* pensoj povas esti pensataj.

Kiel via plej frua pensado ne „*elpensis*“ sian materialon, sed trovis ĝin en sia unua *tera* sperto, tiel

fine via *spirita* sperto devas liveri al vi la konstru-
ŝtonojn, per kiuj vi supervolbu la altan katedralon
de via ekkono ...

Tiam vi ne vane vivis vian surteran vivon kaj ne
senfrukte trasuferis ĝian suferon.

Sekure ŝirmata en via „tiuĉiflanka mondo“, vi
povos konfide atendi vian „transan mondon“, – *jam
hodiaŭ estante certa pri via eterna vivo en dia lu-
mo!*

Fino

Esperanto-tradukoj de aliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj je la retejo:
<http://www.a-rehfeldt.de>